

# LA PLEJ GRANDA RIMEDO

por antaŭenigi harmonion kaj civilizacion

Kompilaĵo el la Bahaaj Skriboj kaj rilataj fontoj  
pri la demando de internacia helpa lingvo

redaktita kaj enkondukita de

Gregory P. Meyjes

© Kopirajto Gregory P. Meyjes 2015  
por la originala angla eldono  
ĉiuj rajtoj rezervitaj

© Kopirajto Bahaa Esperanto-Ligo 2019  
por la esperanta traduko  
ĉiuj rajtoj rezervitaj

ISBN 978-3-948273-00-2

kovrila aranĝo: la eldonejo  
uzante la bildon *La Turo de Babelo* (Roterdamo) de Pieter Bruegel la pli maljuna  
(fonto: Wikimedia Commons, the free media repository)

*Ho membroj de l' parlamentoj tra la mondo!  
Elektu vi ununuran lingvon por la uzo fare de ĉiuj  
surtere kaj adoptu vi ankaŭ skribon komunan. ...  
Tio ĉi estos la kaŭzo de unueco, se nur tion kapablu vi  
kompreni, kaj la plej granda rimedo por antaŭenigi  
harmonion kaj civilizacion, ho ke tion vi perceptu!<sup>1</sup>*

**Bahá'u'lláh**



## ENHAVO

DANKO	vii
ENKONDUKO	ix
I VERKOJ DE BAHÁ'U'LLÁH	3
II VERKOJ DE 'ABDU'L-BAHÁ	9
III PRELEGOJ KAJ RIMARKOJ FARE DE 'ABDU'L-BAHÁ	13
IV SKRIBAĴOJ FARE KAJ NOME DE SHOĜHI EFFENDI	29
V TEKSTOJ FARE KAJ NOME DE LA UNIVERSALA DOMO DE JUSTECO	45
VI TEKSTOJ EL DIVERSAJ FONTOJ	59
ALDONO: SKRIBAĴOJ PRI ALIAJ LINGVOJ	69
GLOSARO	75
BIBLIOGRAFIO	79
POR PLUA LEGADO	85
NOTOJ KAJ REFERENCOJ	87
INDEKSO	103



## DANKO

Pensigas la konsciigo ke tiu ĉi unika kolektaĵo de bahaaj skriboj rezultas el kunlaboro etendiĝinta tra pluraj jardekoj, landoj kaj kontinentoj. Rezulte, la redaktoro ne opinias sin kapabla plenumi sian respondecon juste honori la klopodojn de ĉiuj koncernataj. Tiu ĉi “grupa” projekto, loze aranĝita tempe kaj loke, evidente ŝuldiĝas al la sindediĉo kaj devontigo de ĉiuj kontribuintoj, ĉu konataj aŭ ne.

Nekontestblas tamen, ke la projekto kerne dependis de la iniciato kaj senlacaj klopodoj de du sekretarioj de Bahaa Esperanto-Ligo (BEL), John T. Dale Jr. kaj Bernhard Westerhoff. Por la avanco de BEL kaj de ĝia agado ili origine kompilis la plejparton de la materialo kun la malavara kaj nemalhavebla arkiva asisto de la esplordepartemento de la Bahaa Monda Centro kaj ankaŭ kun la saĝa kaj pacienca gvidado de Ulrich Gollmer, longtempa redaktoro ĉe la germana bahaa eldonejo.

Kun la fundamentaĵoj tiel jam esence metitaj, la nuna redaktoro prenis sur sin la projekton kun la eksplicita aspiro kompletigi la volumon transformante ĝin al io, kio prezentas la bahaajn instruojn pri internacia helpa lingvo nefavoranta iun apartan lingvon kaj valora por ĉiuj legantoj sendepende de ilia ideologia, religia aŭ eduka fono. Cele al inkluzivado, neŭtraleco kaj alireblo – kaj kun la aprezata klera asisto de Marcia Bost – la manuskripto estis sekve reordigita, parte retradukita, redaktita kaj ampleksigita.

Finfine, helpe de la edifa kunlaboro de Wendy Momen flanke de la eldonejo,<sup>a</sup> la libro akiris sian nunan formon.

<sup>a</sup> George Ronald, Oksfordo, kie aperis la angla originalo de tiu ĉi libro

Estas la espero ke ĝi altiros vastan gamon da legantoj tra la monda komunumo. Inspiru kaj instruu ĝi tiujn, kiuj ie ajn studas kaj pripensas ĝian enhavon.

Gregory P. Meyjes  
redaktoro de la originala angla eldono

Al tiuj multaj, kiuj iel kunlaboris je la realigo de tiu ĉi Esperanto-traduko ni ŝuldas nian elkoran dankon. Kaj aparte ni dankas al d-ro Markos Kramer, membro de la Akademio de Esperanto, pro lia afabla kaj skrupula reviziado kaj lingva kontrolado de tiu ĉi kompleta traduko; liaj tre kompetentaj kontribuoj estis ege valoraj. Tamen, estas ni de Bahaa Esperanto-Ligo kiuj faris lastajn decidojn kaj sekve kulpas pri ajna eventuala miso aŭ eraro.

Bahaa Esperanto-Ligo



*Alproksimiĝas la tago kiam ĉiuj popoloj de la mondo estos adoptintaj unu universalan lingvon kaj unu komunan skribon. Kiam estos tio atingita, homo vojaĝanta al kiu ajn urbo kvazaŭ sian propran domon eniros. Tio ĉi estas deviga kaj absolute esenca. Estas la devo de ĉiu homo perceptema kaj komprenema strebi por traduki tion skribitan al realo kaj efektivo.<sup>2</sup>*

Bahá'u'lláh

## ENKONDUKO

Nia mondo paradoksoplenas. Dum fortiĝas tutmondaj retoj, same fortiĝas lokaj iniciatoj. Kiam distancoj inter kulturoj ŝrumpas, estas malsamecoj inter kulturoj pli akute sentataj. Dum eble interkulturaj frotiĝoj plimultiĝas, ĉiutage pli nerefuteble kreskas nia interkonektiteco. Tiaj estas la perpleksigaj kontraŭdiroj niatempaj – havantaj sian efikon sur nin ĉiujn, sendepende de nia socia, kultura aŭ filozofia vidpunkto.

Pro tio ke la tutmonda komunikado nin ĉiujn koncernas, tiu ĉi volumo direktiĝas al ĉiaspecaj legantoj, sendepende de ilia religia aŭ profesia fono. Ĝia precipa celo estas informi kaj inspiri. Klarigoj – ĉu faktaj, terminologiaj, historiaj, doktrinaj aŭ konceptaj – limiĝas al minimumo. Ili ĉefe kaj antaŭ ĉio estas komprenigaj. Ĉu aliras ni la tekston kiel komunikspecialistoj aŭ lingvistoj, esperantistoj aŭ

tradukistoj, unulingvuloj aŭ poliglotoj, budhanoj aŭ agnostikuloj, politikistoj aŭ komunumaj porparolantoj, instruistoj, studentoj aŭ civitanoj koncernataj – tiu ĉi unika kolekto de, parte nenie aliloke presitaj, citaĵoj el la bahaaj skriboj pri la demando de internacia helpa lingvo povas iel esti interesa por ĉiuj.

La baha principo de Internacia Helpa Lingvo (IHL) reprezentas novecan paradigmon por establi pacajn kaj reciprokajn rilatojn inter la etnolingvaj tradicioj de la mondo, ampleksan planon por mondo en kiu la lingva diverseco estas pli juste praktikata kaj samtempe kultura interŝanĝigado pli sisteme establita.

Kiel angulŝtono de tutmonda akordo la IHL-principo celas preventi kaj solvi detruajn streĉitecojn inter la miriadoj da denaskaj tradicioj de la mondo – kaj oferti solidan kaj daŭripovan fundamenton por fruktodona interŝanĝo inter ili. Ke tia nobla lingvopolitika aspiro originas el religio ne surprizos tiujn, kiuj estas familiaraj kun la historio de helpaj lingvoj, kies protagonistoj ofte estis motivitaj kaj ideologie kaj praktike. La baha IHL-doktrino pretendas origini el dia revelacio preta transformi la internajn kaj la eksterajn kondiĉojn de la homaro. Tial konforme al la baha perspektivo la IHL-demando, kiel ajn utilisma laŭ aspekto, estas esence etika kaj havas celon sanktan – ampleksanta kaj eksterajn kaj netuŝeblajn kondiĉojn por establi justajn, harmoniajn kaj sinergiajn rilatojn inter la popoloj de la mondo.

Al tia rimarkinda socilingva doktrino sin dediĉas tiu ĉi unika kolektaĵo el la bahaaj skriboj. Estu klarigate, ke la kanonaj bahaaj tekstoj konsistas ĉefe kaj unuavice el la Vorto revelaciita de Bahá'u'lláh (1817-92), la fondinto de la Bahaa Kredo, kaj de Lia antaŭulo, konata kiel Báb (1819-50). Iliajn skribaĵojn kompletigas la vortoj kaj skriboj de 'Abdu'l-Bahá (1844-1921), la nomumita Interpretanto de la

verkoj de Bahá'u'lláh, kaj la klarigoj fare de kaj Shoghi Effendi (1897-1957), la nomumita Gardanto de la Kredo, kaj la Universala Domo de Justeco, la plej alta bahaa gvidinstanco, unuafoje elektita en 1963. La sekcioj de tiu ĉi volumo spegulas tiun ĉi kronologian kaj epistemologian sinsekvon. Ĉapitro I sekve konsistas el la fundamentaj citaĵoj de Bahá'u'lláh. Sekvas ĝin en ĉapitro II elĉerpaĵoj el la skribaĵoj de 'Abdu'l-Bahá kaj en ĉapitro III elĉerpaĵoj el paroladoj de 'Abdu'l-Bahá, inter ili alparoloj al aŭskult-antaroj en diversaj eŭropaj urboj. Konsiderinda spaco estas asignita al la klarigoj de Shoghi Effendi en ĉapitro IV kaj de la Universala Domo de Justeco en ĉapitro V. Teksteroj el aliaj dokumentoj, inkluzive de personaj rakontoj, estas kolektitaj en ĉapitro VI. Escepte de la teksteroj en ĉapitro VI la elektaĵo en tiu ĉi eldono estas »aŭtentigita«: bahaaj institucioj oficiale atribuis ilin al iliaj respektivaj aŭtoroj. La Aldono entenas skribaĵojn plejparte el la supraj fontoj pri aro da nerekte rilataj lingvaj demandoj.

## LA PRINCIPO DE INTERNACIA HELPA LINGVO

La bahaa aliro - anstataŭ konsideri tutmondan interkomunikiĝadon unuavice el nur funkcia vidpunkto - havas fundamente spiritan karakteron. Ĝi asertas ke de epoko al epoko diaj mesaĝistoj renovigas sociajn instruojn. Ĝi asertas ke ĉiu el tiuj »Manifestiĝoj de Dio« iniciatas kaj inspiras novan socian ordon samtempe kompletigante la antaŭan religian sistemon, tiel permesante al la homaro »antaŭenigi ĉiam-progresantan civilizacion«,<sup>3</sup> kiel asertas Bahá'u'lláh. La principo de la unueco de la homaro, la »pivoto ĉirkaŭ kiu turniĝas ĉiuj instruoj de Bahá'u'lláh«,<sup>4</sup> estas konsiderata kiel la vera fonto de la mondnivele

unuigaj procezoj, kiuj hodiaŭ survojas kaj kiuj radikas en nova dia epoko kaj revelacio. La bahaaj skriboj krome klarigas ke la unueco de la homaro baziĝas sur ĝia egaleco rilate la diversecojn lingvajn, religiajn, rasajn kaj etnajn. Kaj unueco kaj egaleco respegulas dian intencon kaj neniu el ili atingeblas sen la alia. La bahaaj skriboj sekve aŭguras mondon samtempe unuigitan kaj diversecan, plibonigitan kaj markitan pere de siaj multifacetaj tradicioj subtenataj de kulturaj rajtoj.<sup>5</sup>

Elstara elemento en la bahaaj gvidaj tekstoj rilate la atingon de tia unueco pere de egaleco estas la doktrino de la IHL, kies neeviteblan adopton Bahá'u'lláh nomas esenca signo de la »maturiĝo« de la homaro.<sup>6</sup> Ĉu specife kreita aŭ ĉu elektita el inter la ekzistantaj aŭ estingitaj naturaj lingvoj – la IHL ebligu inter denaskaj lingvokomunumoj senbaran interŝanĝon, kies unuaranga graveco estas sendisputa. Tial la IHL servu la duoblan celon nutri internacian unuecon kaj kulturan egalecon pere de la plifaciligado de senembarasa interkultura interŝanĝo same kiel ĝi protektas denaskajn lingvotradiciojn kontraŭ troa elekstera premado. »La starigo de ordo en la mondo kaj la trankvilo de la nacioj« dependas de justeco, proklamas Bahá'u'lláh.<sup>7</sup> La IHL pritraktas la mondan bezonon je »kultura justeco« (Meyjes, 1999) dum ĝi akcelas fidindan komunikadon inter denasklingvaj komunumoj tutmonde. La Universala Domo de Justeco plie klarigas ke la IHL-n devus elekti la »registaroj de la mondo pere de siaj parlamentoj«,<sup>8</sup> kio implicas pli formalan enkondukon ol tiun de iu aktuala aŭ pasinta *lingua franca*<sup>b</sup> – inkluzive la anglan. Aliflanke indikas ĝia »help«-statuso ĝian duarangecon vid-al-vide al originaj lingvotradicioj, kiuj dum la antaŭvidebla estonteco konservos sian elstaran rolon karakterizi originajn

<sup>b</sup> iu ajn natura lingvo aŭ piĝino, kiu uziĝas kiel interlingvo

parolkomunumojn. La pozicio de la IHL kiel helpa al gepatraj lingvoj speguliĝas en la kondiĉo ke la IHL estu instruata en lernejoj – kaj ne akirata hejme. Ke la IHL ne malhelpos la evoluon de la denasklingva akirprocezo speguliĝas en la kondiĉo, ke »en la lernejoj de la estonto du lingvoj estos instruataj – la gepatra lingvo kaj tiu ĉi internacia helpa lingvo«.<sup>9</sup> Fakte, aludoj en la bahaaj skriboj rilate la deziratan lerneblecon de la IHL pli konfirmas ĝian ne-unuarangan pozicion, ĉar la demando de IHL-lernebleco estas en si mem duaranga rilate al la akirado de la gepatra lingvo. Krome, en la bahaaj skriboj ne troviĝas la nocio de Adama aŭ alie esence supera dia lingvo,<sup>10</sup> aŭ de aparta lingvo elektenda pro siaj geografie-politike aŭ socie domina rolo – kvankam estas precizigite ke la IHL taŭgu por senlima internacia komunikado kaj ke ĝi inkluzivu skribsistemon. Esence la bahaa doktrino de la IHL postulas

- a) la elekton pere de fake kompetentaj registaraj reprezentantoj,
- b) de natura aŭ konstruita, vivanta aŭ klasika, funkcie adekvata homa lingvo,
- c) kaj skribo,
- d) por libera kaj efika komunikado inter denasklingvuloj de la diversaj mondaj lingvo-komunumoj,
- e) instruenda duarange al la denaskaj lingvoj tutmonde,
- f) tiel favorante la lingvajn rajtojn de originaj lingvokomunumoj,
- g) bezonata por pli profunde harmonia monda komunumo kaj
- h) la plua evoluigo de ĝia unueco.<sup>11</sup>

## HISTORIA PERSPEKTIVO

El la du historiaj periodoj, kiujn markis pli intensa okupiĝo pri IHLoj, pasis la unua en la 17a-jarcenta Eŭropo. Ŝiritaj inter reveno al renesanca uzado de la klasika latina por la scienca diskurso, ekapero de idiomoj elvokitaj de nacia konscio, Protestantismo, kaj la influo de presilteknologio, sciencistoj pli kaj pli interesiĝis pri objektiva analizado de la universo.<sup>12</sup> Agante ene de kristanaj socioj, ili ofte estis influitaj de dominantaj interpretadoj de Genezo 2:19,<sup>13</sup> kiuj diras ke la lingvo de Adamo respegulas plej perfektan realecon, kies »naturecon« damaĝis aliaj lingvoj evoluintaj poste pro la Babela fenomeno. Neniu el la homaj lingvoj, oni ofte opiniis, ofertus sendubsencan aliron al »vera scio«. Postulante rimedon kapablan esprimi la universon ene de kaj ekster la homo sendepende de la limigoj de konvencio, kulturo kaj kunteksto ili provis krei »universalan lingvon« aŭ »veran signaron« por per ĝi pli perfekte kapti la ekzistadon. Stimulite de novaj eltrovoj pri algebro, stenografio, kriptogramoj kaj ideogramoj ili serĉis pli regulan, realan kaj finfine simplan kodon ol tiun de la tradiciaj naturaj lingvoj. Kun la memfido de la Klerismo, elstaraj pensuloj kiel John Locke, Marin Mersenne kaj Neŭtono (Sir Isaac Newton) tiujn ĉi klopodojn konsideris profitaj por la scienco kaj por la homaro. Esperante objekte reprezenti la universon kelkaj ekkonstruis »filozofiajn« lingvojn surbaze de logikaj konceptoj kaj principoj; aliaj, anstataŭe koncentriĝante je ekzistantaj leksemoj, klopodis krei »universalajn lingvojn« surbaze de supervortaroj. La pli raciemaj kiel Lejbnico (Gottfried Leibniz) kaj Kartezio (René Descartes) koncentriĝis je universalaj konceptoj dum la pli empirie pensantaj kiel Bakono (Francis Bacon) kaj David Hume provis klasifikadon observeblan. Ĉiuj okupiĝis pri scienco serve al la socio.

La »pansofia« lingvoprojekto de Komenio (Johann Comenius) ekzemple intencis kaj esprimi ĉian scion kaj kunigi homaron fremdiĝintan inter si pro la Babela malbeno. Fine eĉ tiaj famaj filozofiaj lingvoprojektoj kiel la *Ars Signorum* (*La arto de la Signoj*, 1661) de George Dalgarno kaj »An Essay towards a Real Character and a Philosophical Language« (Eseo voje al vera signaro kaj filozofia lingvo, 1668) de John Wilkins suferis pro fatalaj logikaj kaj praktikaj malavantaĝoj. Paralelaĵoj inter tiuj ĉi klopodoj kaj pli postaj helplingvaj projektoj estas tamen limigitaj, ĉar la lastaj ne havis la tendencon aŭ rifuzi naturajn lingvojn pro logikaj kialoj aŭ idealsence pretendi katalogi ĉian – multe malpli ontologie »veran« – scion.

Post la proklamo de Bahá'u'lláh en 1863, la malfrua 19a kaj la frua 20a jarcentoj vidis renovigitan ondon da interesiĝo pri helpaj lingvoj. Porparolantoj opiniis ke lingva divers-eco estas ega ĝeno trudata al internacia interkompreniĝo en interdependa mondo – nocio nerekte konfirmita per la admono de Bahá'u'lláh »ke la homaj vivoj ne estu disipataj kaj malŝparataj per la lernado de diversaj lingvoj«. <sup>14</sup> Subtenata de bonkonataj lingvospecialistoj kiel Louis Couturat, <sup>15</sup> Otto Jespersen, <sup>16</sup> Edward Sapir, <sup>17</sup> Johan Šlejer (Johann Schleyer), <sup>18</sup> kaj pli poste Mario Pei, <sup>19</sup> disvastiĝis la ideo ankaŭ en laikaj cirkloj. Vastgame lingvoj estis proponitaj, kreitaj aŭ modifitaj. Escepte de miksitaj sistemoj kiel Volapuko (Volapük, »monda lingvo«) tiu ĉi dua generacio de lingvoprojektoj baziĝis sur naturaj lingvoj kaj al ĝi mankis aprioraj nocioj pri la realeco – kvankam ili restis influitaj de la normoj de simpleco kaj reguleco de la pli fruaj projektoj. Ili inkludis a) klasikajn lingvojn kiel la latinan; b) *Latino Sine Flexione* (latino sen fleksio) kaj aliajn simpligitajn klasikajn lingvojn; c) vivantajn lingvojn kiel la hispanan; d) la anglan kun regulita ortografio kaj simile simpligitajn vivantajn

lingvojn; e) *Basic English* (baza angla), *Français Fondamental* (fundamenta franca) kaj similajn kun draste reduktita vortaro; f) *Weltdeutsch* (*Wedde*, monda germana) aŭ lingvojn simile restrukturitajn preter sia leksiko; g) naturecajn konstruaĵojn similajn al Novial, kunmetitajn el minimume ŝanĝitaj elementoj prenitaj el aro da lingvoj; h) aŭtonomajn kreaĵojn el diversaj gramatikoj kaj vortaroj, strukturitajn tiel regule kiel eble aŭ dezirinde – kiel Esperanto aŭ Ido; kaj i) integritajn konstruitajn lingvoprojektojn similajn al Neo, farita el elementoj de Esperanto, Ido kaj Novial.

Kun siaj dekoj da periodaĵoj kaj centoj da kluboj kaj lernolibroj tutmonde, la impona leviĝo de la volapuka movado fine de la 19a jarcento estis komence konsiderata kiel nerenversebla. Ĝia kreinto, germana pastro kaj filologo kun la nomo Johan Ŝlejer, kaj religie inspirita kaj lingvistike renoma, sukcese atingis plibonigon kompare kun la embarasaj skemoj de la 17a jarcento. Malgraŭ lingvistikaj mankoj, kiuj kondukis al ĝia socia pereco, la propono de Ŝlejer estas rekonita kiel la fakta komenco de modernaj konstruitaj lingvoj (angle: »conlangs«).

Grandparte la fina leviĝo de Esperanto al *primus inter pares*<sup>c</sup> ŝuldiĝas al la humileco kaj politika sagaceco de ĝia iniciatinto. Por eviti la sorton de Volapuko, Ludoviko Zamenhof, juda okulisto el Pollando, invitis aliajn proponi plibonigojn de sia elpenaĵo<sup>20</sup> kaj tiel faciligis ĝian socian kaj lingvan disvastiĝon – kaj pravigis la konstaton atribuitan al ‘Abdu’l-Bahá, ke »neniu unuopa persono povas konstrui universalan lingvon«.<sup>21</sup> La zorgo de Zamenhof pri la adoptebleco de la lingvo nutris lian adaptiĝemon, kio siavice originis en deziro servi al la homaro. Ne permesante ke lia mondpercepto – nomata *Homaranismo* – malhelpu kunlaboron kun pli praktike

<sup>c</sup> elstara inter egalaj



pensantaj esperantistoj, li direktis la movadon sur flekseblan trajektorion, tiel ke ĝi sukcese preterpasis sennombrajn defiojn, kiuj inkludis plurajn skismojn kiel la Ido-derivaĵon fare de grupo de elstaraj sciencistoj. Kvankam malpli videblaj ol dum sia flora periodo antaŭ la Unua Mondmilito kaj intermilito, la esperantistoj hodiaŭ konsistigas ĉirkaŭ 95 elcentojn de la aktivaj »interlingvistoj« kun centmiloj da engaĝitaj membroj en pli ol cent landoj. Kelkaj el ili estas bahaanoj. Ekzemple Lidia, la filino de Zamenhof, estis internacie aktiva esperantistino kaj bahaanino.<sup>22</sup> La bahaanoj kaj iliaj institucioj restas favoraj al la hodiaŭa Esperanto-movado, helpataj de ĝia geografia disvastiĝo kaj stimolitaj de 'Abdu'l-Bahá, Shoghi Effendi kaj la Universala Domo de Justeco. Ke ili tamen ne faris la sekvan paŝon multnombre eklerni la lingvon verŝajne parte ŝuldiĝas al la bahaaj IHL-principo mem, kiu pli ol popolan movadon postulas politikan agon, ian *de jure*<sup>d</sup> interregistaran rezolucion pli ol nuran strebon al socia *fait accompli*.<sup>e</sup> Ĉar la bahaaj skriboj estas komplete kaj eksplicite malfermaj rilate al kiu lingvo estos elektita kiel la IHL, ĉiuj naturaj aŭ konstruitaj lingvoj estas eblaj kandidatoj kaj la finfina elekto restas plene en la manoj de estontaj decidfarantoj. Dum bahaanoj senrezerve subtenas la koncepton de IHL kaj serioze klopodas realigi ĝin, ankaŭ per asociiĝo kun esperantistoj kaj aliaj similpensantoj, ili ne *en masse*<sup>f</sup> elektis la lingvon Esperanto kiel la rimedon por tion fari – fidante ke, kiel laŭraporte diris 'Abdu'l-Bahá, »la amo kaj penado metitaj en Esperanton ne estos perditaj«. <sup>23</sup>

<sup>d</sup> jure agnoskatan, laŭ jura agnosko, laŭleĝe

<sup>e</sup> atingita fakto

<sup>f</sup> amase

KELKAJ TEMOJ PREZENTIĜANTAJ <sup>24</sup>

Atestante pri la homa inĝenio, sennombraj lingvoj hodiaŭ estas konstruataj kaj iliaj detaloj debatataj, inkluzive inter, ekzemple, ludantoj de elektronikaj ludoj.<sup>25</sup> Pridiskutataj estas ofte praaĵaj premisoj pri simpleco, natureco aŭ reguleco. Simpleco ekzemple estas komprenata aŭ laŭ logikaj-kognaj terminoj aŭ surbaze de esencaj gramatikaj proprajoj de homa lingvo.<sup>26</sup> La supera intereso tamen ofte estas la lernebleco por plenkreskuloj kaj aliaj jam preterpasintaj la, pli kaj pli dubatan, »decidan periodon« por denaska lingvoakirado.<sup>27</sup> Dum la baha IHL-koncepto simpatias kun la elekto de lingvo relative facile lernebla, ĝia ĉefa celo verŝajne estos malpli la unua kohorto de plenkreskaj lernantoj tuj post ĝia adopto, ol la sekvaj generacioj da infanoj, kiuj poste akiros ĝin lerneje. Lingvopedagogiaj faktoroj povus tiel forŝovi iujn el la strukturaj konsideroj, kiuj tiel longe absorbis proponantojn de artefaritaj lingvoj. Ankaŭ la kultura neŭtraleco de la vortaroj de planitaj lingvoj daŭre interesis interlingvistojn – kun la ekzistantaj konstruaĵoj, inkluzive de Esperanto, estantaj precipe eŭropcentraj laŭ leksiko-gramatiko. Bahaaj fontoj parolas pri konstruita lingvo »farita el vortoj de ĉiuj lingvoj«,<sup>28</sup> male ol iu malpli universale forĝita. Teorie la vortaroj de konstruitaj IHL-konkurantoj povus esti reviziataj tiel ke ili estus pli inkluzivaj. Tamen, ke la bahaaj skriboj estas akceptemaj rilate la elekton de aŭ natura aŭ planita lingvo, pensigas ke la universaleco de la IHL-leksiko eble ne devas esti aŭ ne ĉiam devas esti la prioritata punkto, ĉar la vortoj kaj esprimoj de iu natura lingvo elektita verŝajne spegulus la relative specifan heredaĵon de ĝia denaska parolkomunumo.

Tamen, ankaŭ la eksteraj ecoj de IHL-kandidatoj incitis pritrakton. La angla estas majoritata gepatra lingvo en

certaj influhavaj landoj, la oficiala lingvo de pli ol 70 nacioj kaj la plej vaste instruata fremda lingvo tra la homa historio, superanta laŭ suma nombro da kompetentaj parolantoj eĉ la lingvaron kutime nomatan „ĉina lingvo“.<sup>29</sup> Kelkaj konsideras la mondan anglan socikulture neŭtrala dum aliaj asociaĵoj ĝin kun senprecedenca socikultura dominado. La demando estas, ĉu la monda angla kapablas funkcii en sufiĉe helpa rolo aŭ ĉu la eksterlingva hegemonio de ĝiaj parolkomunumoj troe subpremas kulturan plurecon tutmonde, tiel seniganta la estontan internacian komunumon je la avantaĝoj de etnolingva diverseco kaj subfosanta la antaŭe menciitan etoson de interkultura justeco kaj simbiozo. Dum la bahaaj skriboj agnoskas la kulturajn rajtojn entenatajn en lingva plureco, ili favoras nek kulturan nostalgion kiel celon en si mem nek la konservadon de lingva diverseco pro kognaj kialoj. Ilia fokuso estas gardi originajn kulturojn kontraŭ ekstera tiraneco, sed ne konservi lingvojn sen kultura signifo, nek rezisti al etnolingva ŝanĝiĝo *per se*.<sup>8</sup>

Kultura ŝanĝiĝo estas normala kaj natura kaj la bahaaj IHL-doktrino neniel ĝin ekskludas. Male, por la malproksima estonteco la bahaaj skriboj parolas pri la iom-post-ioma ekapero de vere tutmonda socio, la »unusola organika konfederacio« priskribita de Shoghi Effendi.<sup>30</sup> Ĝin estos konstante penetrantaj harmoniaj interŝanĝoj inter miriado da originaj kulturoj. Finfine bezonos ĝi sian propran lingvon, iun kiu eble ja rilatas aŭ eble ne rilatas al la IHL. Tiuj evoluoj estas ankoraŭ komplete antaŭtempaj. Por la antaŭvidebla estonteco ni havas antaŭ ni la taskon estigi mondon, kiu harmonie funkciigas la egalecon de etnokulturaj tradicioj. La ĝemelaj defioj hodiaŭaj – konfirmi la diversajn kulturajn heredaĵojn kaj akceli interkulturan

<sup>8</sup> mem, per si mem

interŝanĝon - nedisigeblas. Por ke iu el ili efektiviĝu, ambaŭ devas esti kontentigataj. Por la plenumo de tiu ĉi malfacile atingebla dualeco la bahaaj instruoj pri la helpa lingvo donas netakseblan gvidadon kaj inspiron, konsiderante tian lingvon, kiel konstatis Bahá'u'lláh, »la plej granda rimedo por antaŭenigi harmonion kaj civilizacion«. <sup>31</sup>

Gregory Paul Meyjes  
Atlanta, Georgia, 2015

LA PLEJ GRANDA RIMEDO  
POR ANTAŬENIGI HARMONION  
KAJ CIVILIZACION



## I VERKOJ DE BAHÁ'U'LLÁH

Ho membroj de l' parlamentoj tra la mondo! Elektu vi ununuran lingvon por la uzo fare de ĉiuj surtere kaj adoptu vi ankaŭ skribon komunan. Dio, vere, igas evidenta por vi, kio al vi utilos kaj ebligos esti sendependaj de aliaj. Li, vere, estas la Plej Malavara, la Ĉion-Scianta, la Ĉion-Konanta. Tio ĉi estos la kaŭzo de unueco, se nur tion kapablus vi kompreni, kaj la plej granda rimedo por antaŭenigi harmonion kaj civilizacion, ho ke tion vi perceptu!

(*Kitáb-i-Aqdas*)<sup>32</sup>

\*\*\*

La tria Ĝojnovaĵo koncernas la lernadon de diversaj lingvoj. La jena dekreto jam antaŭe elfluis la Plumon de l' Plej Alta: Estas devo de la suverenoj de la mondo – Dio ilin helpu – aŭ de la ministroj de la tero interkonsiliĝi kaj adopti iun el la ekzistantaj lingvoj aŭ iun novan por ke estu ĝi instruata al la infanoj en la lernejoj tra la tuta mondo, kaj same unu skribmanieron. Tiel la tuta tero estos konsiderata kiel unu lando. Bonon atingas tiu, kiu priatentas Lian Vokon kaj observas kion al li dekretas Dio, la Sinjoro de la Trono Potenca.

(Ĝojnovaĵoj: *Bishárát*)<sup>33</sup>

\*\*\*

Antaŭe jam dekretis Ni, ke la homoj konversu en du lingvoj, sed endas klopodi ilin redukti al unu kaj same la skribmanierojn de la mondo, por ke la homaj vivoj ne estu disipataj kaj malŝparataj per la lernado de diversaj

lingvoj. Tiel la tuta tero konsideriĝus kiel unu urbo kaj unu lando.

(Vortoj de l' Paradizo: *Kalimát-i-Firdawsiiyyih*)<sup>34</sup>

\*\*\*

Estante en la Karcerero de 'Akká revelaciis Ni en la Libro Karmezina tion kondukantan al la progreso de la homaro kaj la rekonstruo de la mondo. La eldiroj tie prezentitaj de la Plumo de la Sinjoro de l' kreaĵo inkluzivas la jenon, kio konsistigas la fundamentajn principojn por la administrado de la homaj aferoj: ... La lingvoj devas esti reduktataj al unu komuna lingvo instruenda en ĉiuj lernejoj de la mondo.

(Tabelo pri la Mondo: *Lawḥ-i-Dunyá*)<sup>35</sup>

\*\*\*

La sesa *Ishráq* estas unueco kaj konkordo inter la homidoj. Ekde la komenco de l' tempo la lumo de l' unueco verŝis sian dian brilegon sur la mondon, kaj la plej granda rimedo por antaŭenigi tiun unuecon estas ke la popoloj de la mondo komprenu la skribon kaj parolon unu de la alia. En antaŭaj Epistoloj komisiis Ni al la Konfiditoj de la Domo de Justeco aŭ elekti iun lingvon el inter tiuj nune ekzistantaj aŭ adopti novan, kaj same ankaŭ elekti komunan skribmanieron, ambaŭ instruendaj en ĉiuj lernejoj de la mondo. Tiel la tero estos konsiderata kiel unu lando kaj unu hejmo.

(Splendoj: *Ishráqát*)<sup>36</sup>

\*\*\*

Ankaŭ diras Li: Inter tio kondukanta al unueco kaj konkordo kaj kaŭzanta ke la tuta tero estos konsiderata



kiel unu lando, estas redukti la diversajn lingvojn al unu lingvo kaj ankaŭ limigi la skribmanierojn uzatajn en la mondo al unu sola skribo. Estas devige por ĉiuj nacioj nomumi kelkajn klerulojn komprenemajn ke kunvenon ili kunvoku kaj pere de interkonsiliĝo unu lingvon elektu el inter la diversaj lingvoj ekzistantaj aŭ novan kreu, instruendan al la infanoj en ĉiuj lernejoj de la mondo.

(Tabelo al Maqşúd: *Lawḥ-i-Maqşúd*)<sup>37</sup>

\*\*\*

Alproksimiĝas la tago kiam ĉiuj popoloj de la mondo estos adoptintaj unu universalan lingvon kaj unu komunan skribon. Kiam estos tio atingita, homo vojaĝanta al kiu ajn urbo kvazaŭ sian propran domon eniros. Tio ĉi estas deviga kaj absolute esenca. Estas la devo de ĉiu homo perceptema kaj komprenema strebi por traduki tion skribitan al realo kaj efektivo.

(Tabelo al Maqşúd: *Lawḥ-i-Maqşúd*)<sup>38</sup>

\*\*\*

Iun tagon, estante en Konstantinopolo, paŝao Kamál vizitis ĉi Mistraktiton. Direktiĝis nia konversado al temoj avantaĝaj por la homo. Li diris, ke li lernis plurajn lingvojn. Responde rimarkis Ni: »Vi malŝparis vian vivon. Decas al vi kaj al la aliaj registaraj funkciuloj kunvoki kunvenon kaj elekti iun el la diversaj lingvoj kaj ankaŭ iun el la ekzistantaj skribmanieroj aŭ alternative krei novan lingvon kaj novan skribon, instruendajn al la infanoj en la lernejoj tra la mondo. Tiamaniere akirus ili nur du lingvojn: unue sian denaskan lingvon kaj krome la lingvon per kiu konversus ĉiuj popoloj de la mondo. Se la homoj firme sin tenus je tio menciita, estus la tuta tero konsiderata kiel unu lando kaj

la popoloj estus senŝarĝitaj kaj liberigitaj de la neceso akiri kaj instrui malsamajn lingvojn.« Dum en Nia ĉeesto konsentis li kaj eĉ elmontris grandan ĝojon kaj plenan kontenton. Ni tiam diris al li ke li submetu tiun ĉi aferon al la oficistoj kaj ministroj de la Registaro por ke ĝi efektiviĝu tra la diversaj landoj. Tamen, malgraŭ ke poste li ofte revenis por Nin viziti, neniam denove li aludis tiun ĉi temon, kvankam tio proponita kondukus al la konkordo kaj la unueco de la popoloj de la mondo.

Ni volonte esperus, ke la persa Registaro tion ĉi adoptos kaj efektivigos. Nuntempe nova lingvo kaj nova skribo estas elpensitaj. Se vi deziras, Ni ilin konatigos al vi. Estas Nia celo ke ĉiuj homoj firme sin tenos al tio, kio malpliigos nenecesan laboron kaj penadon, tiel ke dece estu pasigataj kaj finiĝu iliaj tagoj. Dio, vere, estas la Helpanto, la Scianto, la Ordonanto, la Ĉion-Scia.

(Epistolo al la Filo de l' Lupo: *Lawh-i-Ibn-i-Dhib*)<sup>39</sup>

\*\*\*

Revelaciis Ni en la Kitáb-i-Aqdas: »Ho membroj de l' parlamentoj tra la mondo! Elektu vi ununuran lingvon por la uzo fare de ĉiuj surtere kaj adoptu vi ankaŭ skribon komunan. Dio, vere, igas evidenta al vi, kio al vi utilos kaj ebligos esti sendependaj de aliaj. Li, vere, estas la Plej Malavara, la Ĉion-Scianta, la Ĉion-Konanta.« Tiu ĉi deviga dekreto estas malsupren sendita el la regno de gloro pratempa al la popoloj de la mondo kaj precipe al la parlamentanoj, ĉar la tasko efektiviĝi la leĝojn, la dekretojn kaj statutojn, kiuj malsupren sendiĝis en la Libro, estas delegita al la anoj de la sanktaj Domoj de Justeco, kaj tiu ĉi leĝo estas la plej granda rimedo por atingi unuecon kaj la plej potenca ilo por antaŭenigi la interrilatadon kaj reciprokan estimon de la homoj en ĉiuj landoj. Observ-

eblas ke la plej multaj nacioj, pro la diverseco de la lingvoj parolataj de la popoloj de la mondo, ne kapablas interrilati kaj interligiĝi kaj reciproke profiti el siaj lernado kaj saĝo. Tial, kaj kiel evidenta signo de Nia supera malavareco kaj grandanimeco, estas ordonite al ĉiuj elekti kaj paroli unusolan lingvon, ĉu nove kreitan, ĉu iun el inter la ekzistantaj lingvoj de la tero. Se estos tio plenumita, la tuta tero fariĝos kvazaŭ unu sola urbo, ĉar ĉiuj konos la lingvon unu de alia kaj reciproke komprenos siajn verajn intencojn. Tio ĉi estos la kaŭzo de la antaŭeniĝo kaj ekzaltiĝo de la mondo. Se iu vojaĝos el sia denaska lando, kiun ajn urbon li eniros, estos kvazaŭ li eniros sian propran hejmon. Kroĉiĝu vi je tio ĉi, ho leĝdonantoj kaj civitanoj!

Se iu nur iom pripensus, li perceptus ke kio ajn estas sendita el la ĉielo de l' dia volo estas nenio krom pura malavaro, kies efiko donas profiton al ĉiuj. Certaj animoj tamen tiome suĉis el la mammo de l' malatento kaj sencio, ke ili ignoras tion, kio bonas – tion, kies elstareco, ĉu el la vidpunkto rezona aŭ tradicia, estas kaj klara kaj evidenta; pro tio ke ili sekvas la vantajn asertojn de animoj senatentaj, ne rimarkis ili tiun dian saĝecon, kiu estas la kaŭzo kaj la rimedo por antaŭenigi la mondon kaj levi ĝiajn popolojn. Troviĝas ili, plej certe, en evidenta miso.

Ĉiu popolo konversas en sia propra lingvo, tiel la turkoj en la turka, la irananoj en la persa, la araboj en la araba, kaj la popoloj de Eŭropo en siaj diversaj lingvoj. Tiuj ĉi lingvoj estas aktualaj inter la diversaj popoloj kaj specifaj por ĉiu grupo. Nun alia lingvo estas ordonita por ĉiuj popoloj de la mondo, tiel ke ĉiuj familiariĝu kun la parolado de la aliaj kaj komprenu la intencon unuj de la aliaj. Tio ĉi estas la portalo al amo kaj amikeco, al harmonio kaj unueco, kaj tio ĉi estas la plej granda peranto de senco, la ŝlosilo malŝlosanta la trezoron de Li, Kiu estas la Prahonora de l' Tagoj.

Kiom da animoj tutan sian tempon pasigis per la akirado de diversaj lingvoj! Vere, kiel domaĝe ke homo dediĉas sian vivon, kiu estas la plej kara el ĉiuj aferoj de la mondo, al io tia! La celo de tiuj penadoj lerni la diversajn lingvojn estas kapabli kompreni la intencojn de la multaj nacioj kaj informiĝi pri kio ajn, kion ili posedas. Nu, se tiaj homoj agus laŭ tio dekretita, sufiĉus al ĉiuj kaj povus ĉiuj ŝpari al si la neceson de tiuj ĉi senfinaj penadoj.

Tio, kio estas amata antaŭ Nia trono, estas ke ĉiuj parolu en la araba, ĉar estas ĝi la plej riĉa el ĉiuj lingvoj. Se iu konatiĝus kun la riĉeco kaj vasteco de tiu ĉi elokventa lingvo, li sendube elektus ĝin. La persa lingvo estas tre dolĉa kaj en tiu ĉi Revelacio la Lango de Dio parolis kaj en la araba kaj en la persa; tamen ĝi ne havas la vastecon de la araba. Ne, kompare ĉiuj lingvoj de la tero estas limigitaj kaj tiaj ili restos.

Tio, kio estas dirita pri la araba, esprimas preferon; kiel ajn, Nia intenco estas ke la popoloj de la tero elektu ununuran lingvon kaj ke ĉiuj ĝin parolu. Ĉi tio estas kion dekretis Dio, kaj ĉi tio estas kio donas profiton al la homoj, ho se ili povus nur ĝin aprezi. Ankaŭ elektu ili unusolan skribmanieron, aparte de tiuj propraj al la diversaj popoloj, kaj ĉiuj ĝin uzu, tiel ke ĉiuj skriboj aperu kiel unu skribo kaj ĉiuj lingvoj kiel unu lingvo. Tio ĉi unuigos la korojn kaj animojn de la popoloj de la mondo. Li, vere, informas vin pri tio avantaĝa al vi; kroĉiĝu vi al ĝi. Li, vere, estas la Admonanto, la Konsilanto, la Klariganto, la Dekretanto, la Kompatema, la Ĉion-Scianta, la Plej Saĝa. Finfine ĉiuj lingvoj kaj skriboj kulminos en unu kaj la diversaj regionoj de la tero eĉ konsideriĝos kiel ununura regiono. »Tiam vidos vi en ĝi nek neregulaĵon nek tordiĝon.«

(La Sanktaj Brizoj: *Nafahát-i-Quds*)<sup>40</sup>

## II VERKOJ DE 'ABDU'L-BAHÁ

Ho, honora damo! En pasintaj cikloj, eĉ se establiĝis harmonio, pro la manko de rimedoj la unueco de la tuta homaro tamen ne estis efektivebla. Kontinentoj restis malproksime dividitaj, ja eĉ inter la popoloj de unusama kontinento la asociiĝo kaj pensinterŝanĝado estis preskaŭ ne eblaj. Sekve interrilatado, interkompreniĝo kaj unueco inter ĉiuj popoloj kaj homgrupoj de la tero ne atingeblis. Dum la nuna tago, tamen, la komunikrimedoj multobliĝis kaj la kvin kontinentoj de la tero fakte je unusola kunfandiĝis. Kaj por ĉiu nun facile eblas vojaĝi al ajna lando, asociiĝi kaj interŝanĝi opiniojn kun ĝia popolo kaj familiariĝi helpe de eldonaĵoj kun la kondiĉoj, la religiaj kredoj kaj la pensadoj de ĉiuj homoj. Sammaniere ĉiuj membroj de la homa familio, ĉu popoloj aŭ registaroj, urboj aŭ vilaĝoj, pli kaj pli interdependiĝis. Por neniu plu eblas memsufiĉo, ĉar politikaj ligoj unuigas ĉiujn popolojn kaj naciojn kaj ĉiutage fortiĝas la ligoj komercaj kaj industriaj, agrikulturaj kaj edukaj. Tial la unueco de la tuta homaro en la nuna tago povas esti atingata. Vere, estas tio ĉi nenio alia ol unu el la mirakloj de tiu ĉi mirakla epoko, tiu ĉi glora jarcento. Tion antaŭaj epokoj malhavis, ĉar tiu ĉi jarcento – la jarcento de l' lumo – estas dotita per unika kaj senprecedenca gloro, potenco kaj luminiĝo. Pro tio ĉiutage mirakle aperas nova mirindaĵo. Fine evidentiĝos kiel brile ĝiaj kandeloj lumos en la homa komunumo.

Vidu kiel ĝia lumo nune aŭroras super la malheliĝinta horizonto de la mondo. La unua kandelo estas unueco en la politika sfero, kies unuajn glimojn jam eblas percepti. La dua kandelo estas unueco de pensado en mondaj entreprenoj, kies efektiviĝon post nelonge eblos atesti. La tria kandelo estas unueco en libereco, kiu certe efektiviĝos. La kvara kandelo estas unueco de la religio, kiu estas la angul-

ŝtono de la fundamento mem kaj kiu per la potenco de Dio videbliĝos en plena sia brilego. La kvina kandelo estas la unueco de la nacioj – unueco kiu dum tiu ĉi jarcento estos sekure establita, kaŭzante ke ĉiuj popoloj de la mondo sin konsideros kvazaŭ civitanoj de unu komuna patrujo. La sesa kandelo estas unueco de la rasoj, kiu faros ĉiujn, kiuj vivas surtere, homoj kaj anoj de unu sola raso. La sepa kandelo estas unueco de la lingvo, t.e. la elekto de universala lingvo, kiu estos al ĉiuj homoj instruata kaj per kiu ĉiuj interkomunikos. Ĉio tio neeviteble efektiviĝos, ĉar la potenco de la Regno de Dio helpas kaj asistas je ĝia realigado. (Letero al s-ino Jane Elizabeth Whyte)<sup>41</sup>

\*\*\*

Kaj inter la instruoj de Bahá'u'lláh troviĝas la estiĝo de unu lingvo, kiu estu disvastigata ĉie inter la popoloj. Tiu ĉi instruo estis revelaciita fare de la plumo de Bahá'u'lláh, por ke tiu universala lingvo eliminu miskomprenojn el inter la homaro. (Letero al la Centra Organizo por Daŭra Paco)<sup>42</sup>

\*\*\*

Koncerne la esperantistojn – amikiĝu kun ili. Kiam ajn vi trovos iun kapablan akcepti, transdonu al li la bonodoron de la Vivo...

Estas evidente, ke la esperantistoj estas akceptemaj, kaj vi profunde konas ilian lingvon kaj spertas pri ĝi. Komunikigi ankaŭ kun la esperantistoj de Germanio kaj aliaj lokoj... Ne ĉagreniĝu pro la apatio kaj malvarmo de la Haga kunveno. Fidu je Dio. Nia espero estas, ke inter la homoj la lingvo Esperanto poste havos fortan efikon. Vi nun semis la semon. Certe ĝi kreskos. Ĝia kreskado dependas de Dio. (Letero al individuo)<sup>43</sup>

\*\*\*

Sed rilate la universalan lingvon: Post nelonge signifaj kaj sciencaj diskutoj koncerne ĉi aferon leviĝos inter la homoj komprenemaj kaj kleraj kaj kondukos al la dezirata rezulto. (Letero al individuo)<sup>44</sup>

\*\*\*

Vi skribis pri la lingvo Esperanto. Tiu ĉi lingvo disvastiĝos kaj universaliĝos certgrade, sed poste iu lingvo pli kompleta ol tiu aŭ la sama post kelkaj ŝanĝoj kaj modifoj estos akceptita kaj fariĝos tutmonda. Mi esperas, ke d-ro Zamenhof estos helpata de la nevidebla konfirmo kaj faros grandan servon al la homa mondo. (Letero al individuo)<sup>45</sup>

\*\*\*

Laŭdata estu Dio, ke la Suno de l' Realo ekbrilis per pleja brileco de sur la horizonto orienta. La regionoj de la mondo estas inundataj per ĝia glora lumo. Multajn radiojn havas tiu ĉi Suno: ... La dektria radio estas la disvastiĝo de helpa mondlingvo. (Letero al *The Asiatic Quarterly Review*)<sup>46</sup>

\*\*\*

Koncerne la lingvon Esperanto: La geamikoj jam skribis multnombrajn leterojn, kiuj publikiĝis tra la mondo. Estas mia serioza espero, ke, kiam la esperantistoj ekkomprenos kiagrade tiu ĉi lingvo estas favore rekomendita, ili estos altirataj al la Afero, klopodos traduki kelkajn el la gravaj Tabeloj de Bahá'u'lláh al Esperanto kaj publikigos ilin,

direktos siajn vizaĝojn al la Regno Abhá kaj petegos dian helpon kaj asiston por tiu ĉi potenca entrepreno. (Letero)<sup>47</sup>

\*\*\*

La demando pri universala paco estas unu el la principoj de la instruoj de Bahá'u'lláh. Tiuj ĉi instruoj havas aliajn principojn, kiuj ilin kompletigas, kiel: La unueco de la homaro; la esplorado de vero kaj realo kaj la rezigno pri malnovaj superstiĉoj; unueco kaj religia amikeco; ke religio devas esti la kaŭzo de konkordo; ke ĉiuj religioj devas konformi kun scienco kaj racio; ke ne rajtas daŭri antaŭjuĝoj religiaj, rasaj aŭ naciaj; ke devas esti unueco de la lingvo – tio estas la adopto de universala helpa lingvo, tiel ke ĉiu menso scios du lingvojn, unu la nacia lingvo kaj la alia la universala lingvo... (Letero al la honora William Sulzer)<sup>48</sup>

\*\*\*

Honora d-ro Fareed – Sur li estu Bahá'u'l-Abhá! Ho servanto de la Sankta Sojlo! Vi skribis rilate al Esperanto kaj via parolado ĉe la Kongreso. Estis ĝi plej konvena kaj akceptebla. Laŭeble renkontiĝu kun d-ro Zamenhof kaj montru al li la Kitáb-i-Aqdas (Libro de Leĝoj) kaj traduku la version, kiu koncernas la Universalan Lingvon kaj diru al li: Tiu ĉi klara verso, kiu estis revelaciita antaŭ kvardek kvin jaroj, montriĝos la kaŭzo por disvastigadi vian Universalan Lingvon tra la tuta Oriento. La bahaanoj konsideros la studadon de tiu ĉi lingvo kiel nepran sian devon kaj estos por ili religia devo. Tial viroj, virinoj kaj infanoj, ili ĉiuj ĝin akiros. (Letero al d-ro Ameen Fareed)<sup>49</sup>

\*\*\*



### III PRELEGOJ KAJ RIMARKOJ FARE DE 'ABDU'L-BAHÁ<sup>50</sup>

*Parolado en Parizo, 1913*

Por provizi kompletan interkomprenon inter ĉiuj popoloj, universala helpa lingvo estos adoptita kaj en la lernejoj de la estonteco du lingvoj estos instruataj – la gepatra lingvo kaj tiu ĉi internacia helpa lingvo, kiu estos aŭ unu el la ekzistantaj lingvoj aŭ nova lingvo farita el vortoj de ĉiuj lingvoj – la afero estas decidota fare de koncilio kiu renkontiĝos tiucele kaj kiu reprezentos ĉiujn tribojn kaj naciojn. Tiu ĉi internacia lingvo estos uzata por la funkciado de la parlamento de l' homaro – supera tribunalo de la mondo, kiu estos daŭre establita por arbitracii internaciajn disputojn.<sup>51</sup>

\*\*\*

*Parolado al la esperantistoj de Edinburgo*

Ĉiu movado kiu antaŭenigas unuecon kaj harmonion en la mondo estas bona, kaj ĉio kio kaŭzas malakordon kaj malkontenton estas malbona. Tiu ĉi estas jarcento de iluminiĝo, superanta ĉiujn aliajn pro ĝiaj multaj eltrovoj, ĝiaj grandaj inventoj kaj ĝiaj vastaj kaj diversaj entreprenoj. Sed la plej granda atingo de la epoko, donanta profiton kaj plezuron al la homaro, estas la kreado de helplingvo por ĉiuj. Unueco de lingvo kreas unuecon de koro. Unueco de lingvo estigas pacon kaj harmonion. Ĝi forbalaas ĉiujn interpopolajn miskomprenojn. Ĝi starigas harmonion inter la idoj de l' homo. Ĝi provizas la homan intelekton je percepto pli larĝa, je vidpunkto pli vastpanorama.

Hodiaŭ la plej granda bezono de la homaro estas kompreni kaj esti komprenata. Helpe de la internacia lingvo ĉiu membro de iu komunumo povas informiĝi pri mondaj eventoj kaj konatiĝi kun la etikaj kaj sciencaj eltrovoj de la epoko. La internacia helpa lingvo donas al ni la ŝlosilon – la ŝlosilon de l' ŝlosiloj – kiu malŝlosas la sekretojn de la pasinteco. Helpe de ĝi ĉiu nacio povos ekde nun facile kaj senpene ellabori siajn proprajn sciencajn malkovrojn.

Estas bone sciate, ke studento orientdevena, kiu venas al la Okcidento, je siaj penadoj por konatiĝi kun la malkovroj kaj atingoj de la okcidenta civilizacio devas pasigi valorajn jarojn de sia vivo por akiri la lingvon de la lando al kiu li venas antaŭ ol povos li turniĝi al la studado de la speciala scienco je kiu li interesiĝas. Ekzemple, supozu ni ke junulo el Hindio, Persio, Turkestano aŭ Arabio venas al tiu ĉi lando por studi medicinon. Li devas unue barakti kun la angla lingvo dum kvar jaroj, rezignante pri ĉio alia, antaŭ ol eĉ nur komenci la studadon de medicino. Male, se la internacia helpa lingvo estus instruita en ĉiuj lernejoj dum lia infaneco, estus li lerninta tiun lingvon en sia propra lando kaj povus li poste, kien ajn li dezirus iri, facile daŭrigi en sia speciala fako sen perdi plurajn el la plej bonaj jaroj de sia vivo.

Se hodiaŭ iu deziras vojaĝi eksterlanden, estos li verŝajne serioze malhelpata eĉ se li posedas plurajn lingvojn, ĉar li ne posedas la specifan lingvon de iu popolo. Mi profunde studis orientajn lingvojn kaj scipovas la araban pli bone ol la araboj mem. Mi studis la turkan kaj la persan en mia naskiĝlando kaj krome aliajn lingvojn de la Oriento, sed tamen, kiam mi vizitis la Okcidenton devis mi kunvenigi interpretiston kvazaŭ scipovus mi neniun lingvon. Se, do, estus la internacia lingvo ĝenerale parolata, tiu kaj la persa lingvo sufiĉus por mi en ĉiu lando de la mondo.

Pensu nur kiel la internacia lingvo faciligos interkomunik-

adon inter ĉiuj nacioj de la tero. Duono de nia vivo konsumiĝas per la akirado de lingvoj, ĉar en tiu ĉi iluminita epoko ĉiu homo esperanta vojaĝi en Azio kaj Afriko kaj Eŭropo devas lerni plurajn lingvojn por ke li kapablu konversi kun iliaj popoloj. Sed ĵus akirinte iun lingvon bezonas li jam alian. Tiel oni eble pasigas sian tutan vivon per la akirado de tiuj lingvoj, kiuj obstaklas internacian komunikadon. La internacia lingvo liberigas la homaron je ĉiuj tiuj problemoj.

Mallonge dirite, por kompreni kaj por esti komprenata estas bezonata internacia rimedo. La instruisto kaj la lernanto devas reciproke scii siajn lingvojn por ke la instruisto povu komuniki sian konon kaj la lernanto ĝin ricevi. Tra la tuta mondo estas nenio pli grava ol esti komprenata de viaj kunuloj, ĉar je tio dependas la progreso mem de la civilizacio. Por akiri konon pri la artoj kaj sciencoj oni devas scii kiel paroli, kiel kompreni kaj samtempe kiel igi sin komprenata, kaj tiu ĉi afero de kompreni kaj esti komprenata dependas de la lingvo. Efektivigu tiun ĉi helpan lingvon kaj ĉiuj povos kompreni unu la alian.

Mi memoras epizodon kiu okazis en Bagdado. Estis du amikoj, kiuj ne scipovis la lingvon unu de la alia. Unu malsaniĝis kaj la alia lin vizitis, sed ne povante esprimi sian kompaton vorte li uzis gestojn por diri: »Kiel vi fartas?« Per alia signo la malsanulo respondis: »Baldaŭ mi mortos«. Kaj lia vizitanto, kredante ke la gesto indikus ke li resaniĝas, diris: »Laŭdata estu Dio!«

Per tiaj ilustraĵoj agnoskos vi ke la plej granda afero en la mondo estas kapabli sin mem komprenigi al siaj amikoj kaj kompreni ilin, kaj estas en la mondo neniu pli granda handikapo ol ne povi siajn pensojn komuniki al aliaj. Sed per helpa lingvo ĉiuj tiuj malfacilaĵoj malaperas.

Nun, laŭdata estu Dio, tiu lingvo estas kreita – Esperanto. Ĉi tio estas unu el la specialaj donacoj de tiu ĉi lumplena

jarcento, unu el la plej rimarkindaj atingoj de tiu ĉi granda epoko.<sup>52</sup>

\*\*\*

*Parolado farita en Edinburgo sub la aŭspicio de la Edinburga Esperanto-Societo*

Lia sankta moŝto Bahá'u'lláh antaŭ multaj jaroj verkis libron nomitan »La Plej Sankta Libro«, inter kies fundamentaj principoj estas la neceso krei Internacian Lingvon, kaj Li klarigas la grandan bonon kaj avantaĝon, kiuj rezultos el ĝia uzado.

Ni nun danku la Sinjoron, ĉar la lingvo Esperanto estas kreita. Ni instrukciis ĉiujn bahaanojn en la Oriento diligente studi tiun ĉi lingvon, kaj antaŭ nelonge ĝi disvastiĝos tra la tuta Oriento. Mi petas vin, esperantistojn kaj neesperantistojn, labori fervore por la disvastigo de tiu ĉi lingvo, ĉar ĝi rapidigos la venon de tiu tago, tiu jarmila tago antaŭdirita de profetoj kaj viziuloj, tiu tago kiam, kiel estas dirita, lupro kaj ŝafido trinkos el la sama fonto, leono kaj cervo paŝtiĝos sur la sama paŝtejo. La signifo de tiu ĉi sankta vorto estas ke rasoj malamikaj, nacioj militantaj, religioj malsamaj unuiĝos en la spirito de amo.

Mi ripetas, la plej grava afero en la mondo estas la efektiviĝo de internacia helpa lingvo. La unueco de lingvo transformigos la homaron en unu mondon, forigos religiajn miskomprenojn kaj unuigos Orienton kaj Okcidenton en la spirito de frateco kaj amo. La unueco de lingvo ŝanĝos tiun ĉi mondon el multaj familioj en unu familion. Tiu ĉi internacia helpa lingvo kunigos la naciojn sub unu standardon kvazaŭ la kvin kontinentoj de l' mondo estus fariĝintaj unu, ĉar tiam eblos intersanĝiĝado de pensoj por ĉiuj. Ĝi forigos nescion kaj superstiĉon, ĉar ĉiu ajn infano

de kiu ajn raso aŭ nacio povas daŭrigi siajn sciencajn kaj artajn studojn bezonanta nur du lingvojn – la propran kaj la internacian.<sup>53</sup> La materia mondo fariĝos la esprimo de la mensa mondo. Tiam riveliĝos eltrovoj, multobliĝos inventoj, avancoj la sciencoj grandpaŝe, disvolviĝos la scienca kulturo de la tero pli amplekse. Tiam la nacioj de l' mondo povos uzi la plej freŝan kaj plej bonan penson, ĉar ĝi esprimiĝas per la internacia lingvo.

Se la internacia lingvo fariĝas faktoro de la estonteco, eblos al ĉiuj orientaj popoloj konatiĝi kun la sciencoj de la Okcidento kaj inverse la okcidentaj nacioj familiariĝos kun la pensoj kaj ideoj de la Oriento, tiel plibonigante la kondiĉojn de ambaŭ. Mallonge, tra la starigo de tiu ĉi internacia lingvo la homa mondo fariĝos alia mondo kaj la progreso estos eksterordinara.<sup>54</sup> Estas, do, nia espero ke la lingvo Esperanto baldaŭ disvastiĝos tra la tuta mondo por ke ĉiuj popoloj povu kunvivi en spirito de amikeco kaj amo.<sup>55</sup>

\*\*\*

#### *Parolado al la esperantistoj de Parizo*<sup>56</sup>

'Abdu'l-Bahá diris: Homaj entreprenoj dividiĝas je du specoj: universalaj kaj personaj.

Tiuj klopodoj kiuj kreas ĝeneralan intereson estas universalaj; iliaj rezultoj same estas universalaj, ĉar la homaro interdependiĝis. La hodiaŭaj internaciaj leĝoj estas ege gravaj, ĉar dum la internacia politiko interproksimigas la naciojn – kaj tiel antaŭenigas ligon de unueco kiu efikas kiel magneto altiranta diajn konfirmojn – la rezultoj kaj profitoj estas senlimaj. Tial diru ni ke ĉiu afero universala estas dia kaj ĉiu afero persona estas homa aŭ limigita.

La universala lumo por tiu ĉi planedo estas de la suno kaj la speciala elektra radio kiu ĉi-nokte lumigas tiun ĉi festen-

salonon ekzistas per la invento de la homo. Simile, la agadoj kiuj klopodas starigi solidarecon inter la nacioj kaj inspiri la spiriton de universalismo en la koroj de la idoj de l' homo estas kiel diaj radioj de la suno de l' realeco kaj la plej luma radio estas la alveno de la universala lingvo. Atingi ĝin estas la plej granda virto de la epoko, ĉar tiu instrumento forigos miskomprenojn el inter la popoloj de la tero kaj kuncementos iliajn korojn. Tiu ĉi rimedo ebligos al ĉiu individua membro de la homa familio informiĝi pri la sciencaj atingoj de ĉiuj.

La bazo de scio kaj la elstara penado en tiu ĉi mondo estas instrui kaj esti instruata. Akiri sciencojn kaj poste instrui ilin dependas de lingvo, kaj kiam la internacia helpa lingvo universaliĝos estos facile imageble ke same universaliĝos la akirado de scioj kaj la instruado.

Sendube vi konscias ke en pasintaj epokoj komuna lingvo apartenanta al diversaj nacioj kreis inter ili spiriton de solidareco. Ekzemple, antaŭ mil tricent jaroj estis multaj diverĝaj naciecoj en la Oriento. Estis koptoj en Egiptio, sirianoj en Sirio, asirianoj kaj babilonianoj en Bagdado kaj laŭ la riveroj de Mezopotamio. Inter tiuj ĉi popoloj ekzistis akra malamo; sed kiam ili iom post iom proksimiĝis per komuna protekto kaj komunaj interesoj, la araba lingvo fariĝis la rimedo de interkomunikado kaj ili fariĝis kiel unu nacio. Ĝis hodiaŭ ili ĉiuj parolas la araban. En Sirio, se vi demandas iun el ili, li diros »Mi estas arabo«, malgraŭ ke li estas greko, egipto, siriano aŭ judo.

Ni diras: »Tiu viro estas germano, la alia italo, franco, anglo« ktp. Ĉiuj apartenas al la granda homa familio, sed la barilo inter ili estas la lingvo. La plej granda laborbazo por estigi unuecon kaj harmonion inter la nacioj estas la instruado de universala lingvo. Skribante pri tiu temo antaŭ kvindek jaroj, Lia sankta moŝto Bahá'u'lláh deklaris ke kompleta unuiĝo inter la diversaj nacioj de la mondo

restos revo neefektivigita antaŭ ol internacia lingvo estos instalita.

Miskomprenoj malhelpas homojn asociiĝi reciproke kaj tiuj ĉi miskomprenoj ne estos dispelitaj krom pere de la ilo de komuna komunikbazo. Ĉiu inteligenta homo tion atestos.

La loĝantaro de la Oriento ne estas plene informita pri la okazaĵoj en la Okcidento, nek povas la okcidentanoj starigi simpatian kontakton kun la orientanoj. Iliaj pensoj estas enfermitaj en kesto. La universala lingvo estos la ĉefŝlosilo por malfermi ĝin. Okcidentaj libroj estos tradukitaj al tiu lingvo kaj la Oriento informiĝos pri ilia enhavo; simile orienta scio fariĝos posedo de la Okcidento. Tiel ankaŭ tiuj miskomprenoj troviĝantaj inter la diversaj religioj malaperos. Religiaj antaŭjuĝoj kreas ĥaoson inter la popoloj kaj estigas militadon kaj konfliktojn kaj ne eblas forigi ilin sen komuna rimedo.

Mi estas orientano kaj pro tio mi estas forfermita de viaj pensoj kaj same vi de la miaj. Komuna lingvo fariĝos la plej potenca rimedo voje al universala progreso, ĉar ĝi cementos la Orienton kaj la Okcidenton. Ĝi faros la mondon unu hejmo kaj ĝi fariĝos la dia impulso por homara progreso. Ĝi levos la standardon de la unueco de la homa mondo kaj faros la teron universala konfederacio. Ĝi estigos amon inter la idoj de l' homo kaj kamaradecon inter la diversaj kredoj.

Dankon al Dio, ke d-ro Zamenhof konstruis la lingvon Esperanto. Ĝi posedas ĉiujn latentajn kvalitojn por universala adopto. Ni ĉiuj devas esti tre dankaj al li pro lia nobla penado, ĉar tiumaniere li bone servis la homaron. Ĝi promesas, per senlaca penado kaj sinoferemo flanke de ĝiaj adeptoj, universale akceptiĝi.

Tial ĉiu el ni devas studi tiun ĉi lingvon kaj ĉiel penadi ĝin disvastigi, tiel ke ĉiutage ĝi pli vaste rekonigiĝos, akceptiĝos de ĉiuj nacioj kaj registaroj de la mondo kaj fariĝos parto de

la kursaro en ĉiuj publikaj lernejoj. Mi esperas ke la aferoj de ĉiuj estontaj internaciaj konferencoj kaj kongresoj disvolviĝos en Esperanto.

En estontaj epokoj oni instruos en la lernejoj du lingvojn: la gepatran lingvon unuflanke, kaj la internacian helpan lingvon aliflanke. Konsideru kiel malfacila estas hodiaŭ la homa interkomunikiĝado. Iu eble studis kvindek lingvojn kaj tamen perdiĝos vojaĝante tra iu lando. Mi mem parolas plurajn orientajn lingvojn sed ne scipovas okcidentan lingvon. Se estus tiu ĉi universala lingvo jam penetrinta tra la terglobo, mi estus ĝin studinta kaj vi estus rekte informitaj pri miaj pensoj, kaj mi pri la viaj, kaj aparta amikeco estus formiĝinta inter ni.

Bonvolu sendi kelkajn instruistojn al Persio, por ke ili instruu Esperanton al la juna generacio. Mi jam skribis petante ke kelkaj el ili venu ĉi tien por studi ĝin.

Disvastiĝu ĝi rapide; tiam la homa mondo trovos eternan pacon; ĉiuj nacioj reciproke asociiĝos kiel patrinoj kaj fratinoj, patroj kaj fratoj, kaj ĉiu membro de la komunumo estos plene informita pri la pensoj de ĉiuj.

Mi estas ege dankema al vi kaj dankas vin pro tiuj ĉi noblaj penadoj, ĉar vi kunvenis en la nuna festeno en sinoferema klopodo antaŭenigi tiun ĉi grandan celon. Via espero estas doni potencon servon al la homaro kaj pro tiu ĉi alta celo mi gratulas vin el la fundo de mia koro.<sup>57</sup>

\*\*\*

*Parolado farita ĉe 4 Avenue de Camoëns, Parizo*

Unu el la grandegaj paŝoj al universala paco estus akcepto de universala lingvo. Bahá'u'lláh instrukcias ke la servantoj de l' homaro kunvenu kaj aŭ elektu iun nune ekzistantan lingvon aŭ kreu novan. Tio ĉi estis revelaciita en la Kitáb-i-



Aqdas antaŭ kvardek jaroj. Estas tie montrita, ke la problemo de la diverseco de la lingvoj estas tre malfacila. Estas pli ol okcent lingvoj en la mondo, kaj neniu homo povus ellerni ilin ĉiujn.

La rasoj de l' homaro ne estas izolitaj kiel en pasintaj tempoj. Nun, por proksime rilati kun ĉiuj landoj, necesas kapabli paroli iliajn lingvojn.

Universala lingvo ebligus interrilatadon kun ĉiu nacio. Tiel oni bezonus scipovi nur du lingvojn: la gepatran lingvon kaj la lingvon universalan. Tiu lasta ebligus al homo komuniki kun ĉiu ajn homo tra la tuta mondo!

Tria lingvo ne estus bezonata. Povi paroli kun ano de ĉiu nacio kaj lando sen interpretisto – kiel helpa kaj trankviliga por ĉiuj!

Esperanto estis kreita por tiu ĉi celo: ĝi estas bela inventaĵo kaj grandioza verko, sed ĝi bezonas perfektigon. Esperanto en sia nuna formo estas tre malfacila por kelkaj.

Devus esti kunvokita internacia kongreso konsistanta el delegitoj el ĉiuj nacioj de la mondo, same okcidentaj kaj orientaj. Tiu ĉi kongreso devus formi lingvon akireblan por ĉiuj – kaj ĉiu lando per tio tre multe profitus.

Antaŭ ol tia lingvo estos uzata, la mondo plu sentos la grandegan bezonon de tiu interkomprenilo. La malsameco de lingvoj estas unu el la plej fruktodonaj kaŭzoj de malsimpatio kaj malfido ekzistantaj inter la nacioj, kiuj estas apartigitaj unu de alia – pli ol pro iu ajn alia kaŭzo – pro sia nekapablo kompreni la lingvon unu de alia.

Se ĉiu povus paroli unu lingvon, kiom pli facile estus servi al la homaro!

Tial aprezu Esperanton, ĉar ĝi estas la komenco de la efektivigo de unu el la plej gravaj leĝoj de Bahá'u'lláh, kaj ĝi devas daŭre esti plibonigata kaj perfektigata.<sup>58</sup>

\*\*\*

*Parolado al la esperantistoj en Stutgarto*

En la Afero de Dio ekzistas nenio pli granda ol kunigi la homojn en unueco, ĉar unueco kaj harmonio inter la homoj ĉiam unuavice kondukos al progreso. Kiam ni rigardas la homaron ĉi-perspektive, ni malkovros ke la opinioj pri la originoj de unueco tre malsamas.

Patriotismo estas unu el la rimedoj, kiuj interligas la homojn en pli granda komuneco. Sed patriotismo ne sufiĉas por unuigi la tutan homaron. Ĉar ni scias el pasintaj tempoj ke ekestiĝis multaj intercivitanaĵoj militoj ene de la diversaj popoloj.

Alia speco de komuneco estas la rasa unueco. Sed ankaŭ ĝi ne povas realigi la solidarecon de la homaro, ĉar ni scias el la pasinteco, ke ankaŭ ene de la rasoj ĉiam regis malakordo.

Apartan specon de unueco konsistigas la unueco de lingvo. Ĝia efiko estas pli penetrema. Ofte lingvo fariĝis la rimedo por unuigi diversajn naciojn kaj rasojn. Tio precipe evidentiĝis en la orientaj landoj. Tiel la egiptoj estis aparta nacio; ankaŭ la asirianoj fondis grandan imperion. Granda parto de la antikva klera mondo baziĝis sur la kaldea civilizacio. Unu lingvo fine fariĝis prioritata super la aliaj kaj unuigis ilin ĉiujn, tiel ke la kaldeoj, la asirianoj kaj la egiptoj eĉ forgesis siajn nomojn kaj unuigis. Hodiaŭ ni nomas ilin araboj. Kial? Ĉar la araba lingvo fariĝis superrega inter ĉiuj tiuj popoloj. Se hodiaŭ ni demandas egipton pri lia nacieco, respondos li: »Mi estas arabo.« Same ĉe la kaldeoj kaj asirianoj. Ili dirus ke ili estas araboj. Tio ĉi pruvas al ni, ke la lingvo kapablas unuigi la popolojn en ununura interligo.

La modernaj nacioj havas multajn konfliktojn kaj malakordojn inter si, kies kaŭzoj certe plejparte originas el lingvaj miskomprenoj. El tio naskiĝis la ideo ke ĉiuj popoloj havu komunan lingvon. Tio efikus multe pli ol

patriotismo aŭ rasa konscio. Tial Bahá'u'lláh, Kiu aperis en la Oriento, inkluzivis inter Siaj instruoj la instaligon de ununura lingvo, por ke tiu ĉi internacia helplingvo fariĝu la plej forta rimedo por interligi la diversajn naciojn. La miskomprenoj inter la popoloj kaj rasoj per tio estos forigataj. Estas tiom da lingvoj, ke ni, eĉ se ni lernus dek lingvojn, ĉiam denove renkontus popolojn, kiuj komprenas neniun el ili. Imagu ke germano, lerninta la germanan lingvon, venas al Francio – tie li devas lerni la francan; se li dezirus iri al Anglio, la franca tie ne utilis por li. Se li do estas inteligenta persono kiu komprenas ĉiujn tri lingvojn sed volas iri al Italio, li devas lerni la italan. Kaj se iu estus tiel genia ke li ja regus la okcidentajn lingvojn – kion li farus kun ili en la Oriento? Mallonge, se iu homo estus tia genio, ke li lernus ĉiujn lingvojn de la mondo, kiel tio utilis al li? Tial la plej bona solvo estas fondi helpan lingvon, kiun bonvenigas ĉiuj popoloj.

D-ro Zamenhof nun eltrovis tian lingvon. Kiam tiu ĉi lingvo iam estos enkondukita en ĉiuj lernejoj de la mondo, tio ĉi certe kondukos la popolojn al la apogeo de interkompreniĝo. Tiam ĉiu devos lerni nur du lingvojn: unu estas la lingvo de la hejmlando kaj la alia la helpa lingvo de la tuta mondo. Kun la disvastiĝado de la helplingvo tra la tuta mondo ĉesos multe da miskomprenoj; ja miskomprenoj, kiel dirite, kaŭzas la plej multan damaĝon, kaj la kaŭzo de ĉiuj tiuj miskomprenoj ja estas ĝuste la manko de tiu ĉi lingvo. Ni prenu plej proksiman ekzemplon: kvankam staras mi tie ĉi antaŭ vi, kiel malfacilas al mi fari min komprenata al vi, kaj tute ne eblas komuniki al vi miajn plej internajn sentojn. Se tiu ĉi internacia helplingvo jam estus enkondukita, povus mi paroli al vi sen tiuj ĉi du interpretistoj. Tiu ĉi internacia helplingvo fariĝos la sekura fundamento por la kunligiĝo de la popoloj. Ĝi estos ege grava eĉ por unuigi la religiojn.

En la Oriento estas multe da judoj, kristanoj kaj islamanoj. Ĝis hodiaŭ neniam intermilitis la kristanaj araboj kaj la islanan araboj, ĉar ili povis reciproke interkompreniĝi; ili povas interŝanĝi siajn pensojn. Male, ĉiam intermilitis turkoj, bulgaroj kaj grekoj, ĉar ili neniam povis interkonsenti pri komuna lingvo. Ĉio tio nekontesteble pruvas ke internacia helplingvo unuigos la homaron.

Se mi komprenus vian lingvon, mi povus senpene ĉion priparoli kun vi. Sed ĉar tiu ĉi internacia helplingvo ankoraŭ ne sufiĉe disvastiĝis, bezonas mi du interpretistojn. Kiel malfacila estas tio! Kiel bele, kiel grandioze estus, se ni povus interkompreniĝi per unu sama lingvo. Tiam Oriento kaj Okcidento povus unuiĝi – ni sentus nin kvazaŭ kiel unu nacio. Tial ni ĉiuj strebu, ke la lingvo Esperanto vaste disvastiĝos por ke granda kamaradeco estiĝu inter la homoj.

Kio ajn utilas por ĉiuj estas de dia origino. La radioj de la suno brilas por ĉiuj same, tial ili estas diaj. La benaj efikoj de la pluvo donas profiton al ĉiuj, tial ili estas diaj. La diaj benoj fluas al ĉiuj, tial ili estas diaj. Tial ĉiu rimedo unuiganta la homaron devenas el dia fonto.

Ni povas diri ke la universala helplingvo Esperanto estas unu el la benoj, kiuj originas el la dia mondo, ĉar ni vidas ĝian efikon. Ni devas labori kaj penadi, por fari tiun ĉi lingvon parto de la kursaro en ĉiuj lernejoj. Se mi povus esprimi miajn pensojn per tiu ĉi lingvo, mi povus diri al vi ankoraŭ multon. Tio pli facile nin unuigos. Estas absoluta devo de ĉiu el ni helpi akceli la ellernadon de la ĝenerala helplingvo, ĉar ĝi fariĝos la rimedo por levi la standardon de la monda paco kaj de la frateco inter ĉiuj. Pro la duobla tradukado ne eblas al mi diri pli multe.<sup>59</sup>

\*\*\*

*En Londono*

La amo kaj penado metitaj en Esperanton ne estos perditaj... sed neniu unuopa persono povas konstrui universalan lingvon. Ĝi devas esti farita de konsilio reprezentanta ĉiujn landojn kaj devas enteni vortojn el diversaj lingvoj. Ĝin regos la plej simplaj reguloj, kaj ne estos esceptoj: nek estos genro, nek ekstraj kaj neprononcataj literoj. Ĉio indikita havos nur unu nomon. En la araba estas centoj da nomoj por la kamelo! En la lernejoj de ĉiu nacio estos instruata la gepatra lingvo kaj ankaŭ la reviziita universala lingvo.<sup>60</sup>

\*\*\*

*Mesaĝo al esperantistoj prezentita en Vaŝingtono D.K.*

Hodiaŭ la plej granda bezono de la homa mondo estas ĉesigi la ekzistantajn miskomprenojn inter la nacioj. Tio ĉi estas atingebla per lingva unueco. Nur se realiĝos la lingva unueco povas efike organiziĝi kaj instaliĝi la Plej Granda Paco kaj la unueco de la homaro, ĉar la funkcio de lingvo estas videbligi la misterojn kaj sekretojn de la homaj koroj. La homa koro estas kiel kesto, kaj lingvo estas la ŝlosilo. Nur uzante ŝlosilon povas ni malfermi la keston kaj rigardi la entenatajn gemojn. Tial la demando de internacia help-lingvo estas de plej granda graveco. Pere de tiu ĉi ilo internacia edukado kaj trejnado ebliga; la evidentajoj kaj la historio de la pasinteco akireblas. La disvastiĝo de la konataj faktoj de la homa mondo dependas de lingvo. La klarigo de diaj instruoj eblas nur per tiu ĉi rimedo. Tiel longe kiel daŭros lingva diverseco kaj manko de kompreno de aliaj lingvoj ne povos efektiviĝi tiuj ĉi gloraj celoj. Tial la prioritata servo al la homa mondo estas instali tiun ĉi internacian helpan komunikrimedon. Ĝi fariĝos la kaŭzo de

la trankvileco de la homa konfederacio. Pere de ĝi sciencoj kaj artoj disvastiĝos inter la nacioj, kaj ĝi montriĝos esti la rimedo por la progreso kaj evoluado de ĉiuj rasoj. Per ĉiuj niaj povoj devas ni penadi tiun ĉi internacian helpan lingvon instali tra la mondo. Estas mia espero ke pere de la malavarecoj de Dio ĝi perfektigu kaj ke inteligentaj homoj elektiĝu el la diversaj landoj de la mondo por organizi internacian kongreson kies ĉefa celo estos la propagando de tiu ĉi universala lingva rimedo.<sup>61</sup>

\*\*\*

*El parolado en la Baptista Templo, Filadelfio*

Naŭe, universalan lingvon adoptos kaj instruos ĉiuj lernejoj kaj institucioj de la mondo. Komitato nomumita de naciaj edukinstitucioj elektos taŭgan lingvon uzendan kiel rimedo de internacia komunikado. Ĉiuj devos ĝin akiri. Tio ĉi estas unu el la grandaj faktoroj je la unuiĝo de la homaro.<sup>62</sup>

\*\*\*

*El parolado en la All Souls Unitarian Church, Novjorko*

Diverseco de lingvoj estis fruktodona kaŭzo de malkonkordo. La funkcio de lingvo estas peri la penson kaj intencon unu al alia. Tial ne gravas kiun lingvon homo parolas aŭ uzas. Antaŭ sesdek jaroj Bahá'u'lláh pledis por unu lingvo kiel la plej granda rimedo por unueco kaj la bazo de internacia interkomunikado. Li skribis al la reĝoj kaj gvidantoj de la diversaj nacioj rekomendante ke unu lingvo estu sankciata kaj adoptata de ĉiuj registaroj. Laŭ tio ĉiu nacio akiru la universalan lingvon aldone al sia propra lingvo. La mondo tiel intime interkomunikus, interkonsil-

iĝado ĝeneraliĝus kaj disputoj kaŭzitaj de lingva diverseco estus forigitaj.<sup>63</sup>

\*\*\*

*El parolado en la Church of the Messiah, Montrealo*

Bahá'u'lláh proklamis la adopton de universala lingvo. Oni interkonsentos pri unu lingvo per kiu unueco establiĝos en la mondo. Ĉiu persono devos lerni du lingvojn: sian denaskan lingvon kaj la universalan helpan parolrimedon. Tio ĉi faciligos interkomunikadon kaj dispelos la miskomprenojn kiujn kaŭzis en la mondo la lingvaj baroj. Ĉiuj popoloj adoras la saman Dion kaj estas same Liaj servantoj. Kiam ili povos libere komuniki, kuniĝos ili amike kaj konkorde, vartos plej grandan amon kaj kamaradecon unu al alia kaj efektive interplektiĝos la Oriento kaj la Okcidento en unueco kaj interkonsento.<sup>64</sup>

\*\*\*

*El parolado en la St. James Methodist Church, Montrealo*

Dekunue, unu lingvo devas esti elektita kiel internacia rimedo por parolo kaj komunikado. Tra tiu ĉi rimedo malpliĝos miskomprenoj, establiĝos kamaradeco kaj garantiĝos unueco.<sup>65</sup>

\*\*\*

*El parolado en la hejmo de Juliet Thompson, Novjorko*

Bahá'u'lláh anoncis la neceson havi universalan lingvon, kiu servos kiel rimedo de internacia komunikado kaj tiel

forigos miskomprenojn kaj malfacilaĵojn. Tiu ĉi instruo estas donita en la Kitáb-i-Aqdas (Plej Sankta Libro) publikigita antaŭ kvindek jaroj.<sup>66</sup>

\*\*\*

*Respondo al demando farita en la Golden Circle Club, Bostono*

Antaŭ kelkaj semajnoj mi skribis leteron el Novjorko al unu el la pledantoj por Esperanto dirante al li, ke tiu ĉi lingvo povus fariĝi universala se establiĝus konsilio de delegitoj elektitaj el inter la nacioj kaj gvidantoj, kiu diskutus pri Esperanto kaj konsiderus la rimedojn por ĝin reklami.<sup>67</sup>

\*\*\*

*El parolado farita en la Unitarian Church, Montrealo*

Sepe, universala lingvo estas necesa. Oni adoptu lingvon akireblan de ĉiuj. Ĉiu persono devos lerni du lingvojn – unu lia propra kaj la alia la universala, tiel ke ĉiuj personoj havos komunikrimedon. Tio forigos miskomprenojn inter la diversaj nacioj. Ĉiuj adoras unu Dion kaj ĉiuj estas la servantoj de la unusola Dio. Malkonsentoj okazas kiam homoj ne povas reciproke sin kompreni. Kiam ili povas konversi per la sama lingvo, forfandiĝos malkonsentoj kaŭze de miskomprenoj dum amo kaj harmonio ekregos. Oriento kaj Okcidento tiam interplektos la manojn kaj reciproke unuiĝos en firma unio.<sup>68</sup>

\*\*\*



#### IV SKRIBAĴOJ FARE KAJ NOME DE SHOGHI EFFENDI

Li [Bahá'u'lláh], plue, en Sia Plej Sankta Libro dekretis elekti ununuran lingvon kaj adopti komunan skribon por la uzo fare de ĉiuj sur la tero, dekreto kiu, kiam plenumita, estus, kiel Li Mem asertas en tiu Libro, unu el la signoj de la »maturiĝo de la homa raso«.

*(God Passes By)*<sup>69</sup>

\*\*\*

La dekreton »asociiĝi kun ĉiuj homoj en spirito de amikeco kaj kamaradeco« Li [Bahá'u'lláh] plu emfazas, kaj rekonas tian asociiĝon kiel favoran al »unuiĝo kaj konkordo«, kiuj, Li konfirmas, estas la starigantoj de ordo en la mondo kaj la vivigantoj de la nacioj. La neceson adopti universalan lingvon kaj skribon Li ripete emfazas, priploras la tempodisipon kaŭzatan de la studado de diversaj lingvoj, konfirmas ke per la adopto de tia lingvo kaj skribo la tuta tero estos konsiderata kiel »unu urbo kaj unu lando«, kaj asertas posedi konon pri ambaŭ kaj esti preta sciigi ĝin al iu ajn petanta ĝin de Li.

*(God Passes By)*<sup>70</sup>

\*\*\*

Monda lingvo estos aŭ elpensita aŭ elektita el la ekzistantaj lingvoj kaj estos instruata en la lernejoj de ĉiuj federigiĝintaj nacioj kiel helpa aldono al ilia gepatra lingvo. Monda skribo, monda literaturo, unuforma kaj universala sistemo de valuto, peso kaj mezuro simpligos kaj faciligos inter-

rilatadon kaj interkompreniĝon inter la nacioj kaj rasoj de la homaro.

(*World Order*)<sup>71</sup>

\*\*\*

Nun kun pleja forto vi devas fari grandegan penon instrui kaj stimuli la disvastigon de Esperanto, ĉar ĝi akiris grandan gravecon, kaj okupi vin tradukante la Skribaĵojn – precipe la gravajn, ĝeneralajn epistolojn – sendante ilin al tiu ĉi servanto por ke ili eldoniĝu.

(Letero de la 18a de Oktobro 1925)<sup>72</sup>

\*\*\*

Se la orientaj geamikoj dezirus akiri tiomgradan mastradon de okcidenta lingvo ke tio ekipus ilin por eki korespondadon kun la okcidentaj geamikoj, kaj se la okcidentaj geamikoj dezirus akiri similan mastradon de orienta lingvo, tio por la plej multaj el ili montriĝus peniga kaj tempkonsuma tasko. Pere de Esperanto la kazo estas malsama, ĉar ĝi estas lingvo facila kaj parole kaj skribe. Se la geamikoj lernus tiun ĉi lingvon, la rezulto estus generado de pli granda sento de amo kaj unueco inter ili, kaj tio ebligus propagandi la Instruojn revelacitajn por tiu ĉi Nova Epoko fare de la Reĝo Glora. Faru vi plejan penadon do je tiu ĉi laŭdinda entrepreno, tiel ke vi povu helpi je la diskonigo eksterlanden de la aromoj de la Manifestiĝo de Dio kaj ke ĝojigos kaj feliĉigos vi la korojn de la geamikoj.

(Letero de la 30a de Januaro 1926)<sup>73</sup>

\*\*\*

Estis por mi plej granda plezuro ricevi la unuajn numerojn de la Bahaa Esperanto-Gazeto kaj ekscii pri la brila komenco kiun vi faris sur vojo kiu, mi estas certa, vin fine kondukos al glora kaj daŭra sukceso.

Mi aklamas la inaŭguron de internacia bahaa organo tiel ege bezonata en la nuna stato de nia laboro kaj destinita fari servojn unikajn por la diversaj partoj de la ĉiam etendiĝanta bahaa mondo.

Kvankam limigita en sia influosfero kaj modesta en sia formo, ĝi tamen pro la esenca rolo kiun ĝi plenumas kreskados al ĉiam pli granda sukceso kaj pravigos sian pretendon kiel la unusola rimedo de internacia bahaa interkomunikado. Por ke ĝi sukcesu tiucele tiuj, kiuj respondecas pri ĝia eldonado kaj evoluigo, devas elpensi vojojn kaj rimedojn por instali kaj daŭrigi regulan kaj oftan komunikadon kun la diversaj bahaaj Naciaj Spiritaj Asembleoj, por ke iom post iom tiu ĉi multpromesa revuo fidele portretu, forte kaj bele, la diversajn atingojn de bahaaj komunumoj tra la mondo.

Mi vin certigas pri mia plej profunda interesiĝo pri tiu freŝa kampo de bahaa agado kaj pri mia granda deziro akceli en tiaj partoj de la bahaa mondo, kie la nunaj cirkonstancoj tion permesas, la studadon de internacia lingvo kiu estas tiel evidente kaj praktike utila por nia konstante avancanta Afero.

(Letero al la redaktoro de *La Nova Tago*)<sup>74</sup>

\*\*\*

Miaj karaj kunlaborantoj en la servo al la homaro:

Okaze de la malfermo de la deknaŭa Universala Kongreso de Esperanto en Dancigo estas granda plezuro por mi turniĝi al vi kaj deziri al vi tutkore plenan sukceson en la granda laboro kiun vi faras por antaŭenigi la bonon de la homaro.

Interesos vin ekscii, mi estas certa, ke rezulte de la ripetaj

kaj emfazaj admonoj de 'Abdu'l-Bahá, Liaj multaj sekvantoj eĉ en la foraj vilaĝoj kaj vilaĝetoj de Persio, kien ĝis nun la lumo de okcidenta civilizacio apenaŭ penetris, kaj ankaŭ en aliaj landoj tra la Oriento, energie kaj entuziasme studas kaj instruas Esperanton, pri kies estonteco ili vartas la plej altajn esperojn.

Mi esprimas la sentojn de la sennombraj sekvantoj de la Kredo tra la mondo, kiam mi per tiu ĉi letero kore esprimas al vi niajn sincerajn bondezirojn kaj ofertas fervorajn preĝojn por la sukceso de via nobla celo.

(Letero al la Deknaŭa Universala Kongreso de Esperanto, la 17a de Aprilo 1927)<sup>75</sup>

\*\*\*

Cele al la komunikado kaj korespondado inter la geamikoj de la Oriento kaj la Okcidento, tiu ĉi lingvo [Esperanto] kaj skribo estas ambaŭ ege taŭgaj, ĉar, iam posedataj – kio povas okazi post jam mallonga tempo – ili ekipos la geamikojn per ilo per kiu ili povos interŝanĝi novaĵojn kaj opiniojn, kaj rimedo kiun ili povos uzi por fortigi la ligojn de amo kaj kamaradeco inter si.

(Letero al individuo, la 18a de Majo 1927)<sup>76</sup>

\*\*\*

Okaze de la malfermo de la dudeka Universala Kongreso de Esperanto mi deziras rekonfirmi, nome de la bahaanoj kaj de la Oriento kaj de la Okcidento, la sentojn de bonvolo, kamaradeco kaj ama simpatio, kiuj animas la adeptojn de Bahá'u'lláh en ilia sinteno rilate la laboron je kiu vi tiom noble kaj sindediĉe engaĝiĝas.

Mi povas certigi al vi ke la membroj de la tutmonda bahaa komunumo sekvas kun kreskanta intereso kaj aŭtenta

espero la progreson de viaj laboroj kaj sentas ke pere de viaj noblaj klopodoj vi antaŭenigas unu el la elstaraj principoj proklamitaj de Bahá'u'lláh.

Ili dividas kun mi la fervoran esperon ke en la tagoj venontaj pli intimaj ligoj de kunlaboro kaj kamaradeco ligos la esperantistojn de la mondo kun nia amata Kredo, kaj ke la establiĝo kaj flegado de intimaj rilatoj inter bahaanoj kaj esperantistoj montriĝos favora al la plibonigo de la homaro.

Gvidu kaj benu la Ĉiopova viajn interkonsiliĝojn kaj bongrace asistu vin konduki la diversajn popolojn kaj naciojn de dolore dividita mondo al pli intima interkompreniĝo kaj komunio.

(Letero al la 20a Universala Kongreso de Esperanto, la 4a de Majo 1928)<sup>77</sup>

\*\*\*

Interesis lin viaj klopodoj fari la anglan lingvon, kiu sendube estas la plej ĝenerale parolata kaj plej vaste komprenata, la helpa lingvo de la mondo, kaj ni devos atendi por vidi kiel la aliaj eŭropaj nacioj reagos. Kompreneble, kiel bone vi esprimis, sole jam la ekzisto de antaŭjuĝo ne estas argumento kontraŭ la ebleco universaligi ekzistantan lingvon. La mondo devas provi siajn multajn difektojn venki kaj ne ilin plifortigi. Eble estonte la ĉefa konsidero estos la specifaj ecoj de lingvo kiel ĝiaj precizeco, riĉeco kaj lernfacileco por kaj la Oriento kaj la Okcidento.

(Letero de la 18a de Majo 1928)<sup>78</sup>

\*\*\*

Kion Bahá'u'lláh diras estas, ke la Supera Domo de Justeco nomumos komitaton kiu studos la tutan aferon

kaj sekve aŭ elektos unu el la ekzistantaj lingvoj aŭ kreos novan, funkcionta kiel internacia lingvo. La Majstro neniam transpaŝis tion, t.e. Li neniam provis solvi Mem la problemon kaj elekti tiun lingvon. Li ankoraŭ lasas tion al la Supera Domo de Justeco. Sed Li diras ke Esperanto disvastiĝos kaj eĉ kuraĝigis ĉiujn geamikojn, kiuj eble kapablas, lerni ĝin. Fakte la scipovo de Esperanto pruviĝis tre utila por tiuj, kiuj provas instrui [la Bahaan Kredon] en diversaj landoj de la mondo. Sed ĉu Esperanto fariĝos la internacia lingvo, kiu estas de ni lernenda kiel parto de niaj religiaj kaj sociaj devoj, tion neniu scias, kaj ni ne havas ateston, ke la Majstro faris tiurilate iujn definitivajn konstatojn. La Majstro apenaŭ iam anticipis la solvon de problemo, kiun Bahá'u'lláh transdonis al la Supera Domo de Justeco. Esperanto eble fariĝos *iu* internacia lingvo, sed dependas de la Domo de Justeco ĉu ĝi elektiĝos kiel *la* internacia lingvo. Kaj neniu kapablas tion antaŭdiri.  
(Letero de la 30a de Aŭgusto 1928)<sup>79</sup>

\*\*\*

Shoghi Effendi deziras ke mi konfirmu la ricevon de via letero datita la 18an de Aŭgusto 1930 kaj esprimu lian profundan aprezon de la laboro kiun vi kaj la aliaj geamikoj faris ĉe la Kongreso de Esperanto okazinta en Oksfordo. Li esperas ke viaj klopodoj donos grandajn fruktojn kaj igos multajn animojn vere aprezi la Kredon. Li esperas ke rezulte de la agadoj de la bahaaj esperantistoj tiu societo konscios ke baldaŭ ili devos kunfandi sian limigitan idealon de unu helpa lingvo kun la pli granda kaj pli universala idealo de unu mondo unuigita – sub la standardo kaj instruoj de Bahá'u'lláh. Intertempe Shoghi Effendi esperas ke vi tenos kontakton, ĉu koresponde, ĉu

alimaniere, kun tiuj kiuj interesiĝis kaj ke vi igos ilin akcepti la Kredon en sia tuteco.

(Letero de la 19a de Septembro 1930)<sup>80</sup>

\*\*\*

La bahaanoj ĉiam konsideris kun profunda intereso kaj admiro la bonegan laboron, kiun la esperantistoj plenumas realigante unu el la plej gravaj principoj de ilia Kredo. Multaj el ili estis stimilitaj studi tiun lingvon kaj partopreni en la propagandado de ĝiaj multaj celoj. Ili tial tre volonte kunlaboros kun vi en aferoj de komuna intereso ... Alproksimigu Dio la tagon kiam viaj esperoj same kiel la niaj realiĝos.

(Letero de la 14a de Marto 1932)<sup>81</sup>

\*\*\*

Estas forta ligo kiu unuigas la bahaanojn kaj la esperantistojn, ĉar ambaŭ penas krei mondan komunumon en kiu lingvaj malsamecoj ĉesos disigi popolojn kaj naciojn, sed kiu male servos por nutri inter ili la spiriton de servado kaj bonvolo. Bahá'ú'lláh ebligu al vi fortigi tiun ĉi ligan de amikeco kaj kunlaboro pere de via daŭra partopreno en ĉiuj kunvenoj kaj kongresoj esperantistaj, por ke vi povu disvastigi Lian Mesaĝon kun kreskanta forto kaj sukceso.

(Letero de la 30a de Aŭgusto 1933)<sup>82</sup>

\*\*\*

Li aparte petis min peri al vi lian plej sinceran aprezon de viaj servoj rilate al la eldonado de *La Nova Tago*, kiu, li esperas, pere de viaj klopodoj kaj tiuj de la Esperanton parolantaj bahaanoj kaj en Germanio kaj eksterlande,

evoluos iom post iom al gvida Esperanto-revuo kaj tiel fariĝos efika rimedo por la disvastigo de la Instruoj en esperantistaj cirkloj tra la mondo. Konsiderante la vastajn eblojn, kiujn tiu ĉi publikigaĵo povas havi kiel instrua organo, li urĝis la germanan Nacian Spiritan Asembleon ĝin ree eldoni kiam, antaŭ kelkaj monatoj, ili preskaŭ decidis ĉesi ĝian presadon.

Rilate vian peton je speciala artikolo de la Gardanto, kiun vi deziras publikigi en la venonta numero de via revuo: Li proponas ke vi traduku lian ĝeneralan leteron adresitan al la geamikoj antaŭ kelkaj jaroj sub la titolo *The Goal of a New World Order* [La celo de nova monda ordo], ĉar tio ĉi liaopinie estas tre taŭga materialo por publikigo en tiu revuo kaj estas multe pli bona ol io alia kion momente li povus verki.

Koncerne vian proponon pri pli vasta uzo de Esperanto kiel korespondilo inter la bahaanoj: Shoghi Effendi ĉiam kuraĝigis, kiel vi scias, la kredantojn kaj en la Oriento kaj en la Okcidento intense studi tiun lingvon kaj konsideri ĝin kiel gravan perilon por la disvastigo de la Kredo en internaciaj rondoj. Precipe li urĝis la geamikojn bone reprezenti la Kredon en ĉiuj Esperanto-kongresoj kaj -asocioj kaj per tio flegi pli grandan amikecon kaj kunlaboron inter la bahaanoj kaj la esperantistoj.

Sed tiurilate li opinias ke li devas klarigi ke, kvankam la Kredo observas kun multe da simpatio kaj aprezo la agadojn kiujn la esperantistoj pli kaj pli iniciatas por la disvastigo de sia lingvo, el ĝia vidpunkto la adopto de Esperanto fare de la tuta mondo tamen neniel estas *neevitebla* fakto. Nek Bahá'u'lláh nek eĉ 'Abdu'l-Bahá iam konstatis ke Esperanto estos *la* internacia helplingvo. La Majstro simple esprimis la *esperon* ke ĝi, se certaj kondiĉoj estos plenumitaj, evoluos al tia komunikilo.

(Letero de la 3a de Aŭgusto 1935)<sup>83</sup>



\*\*\*

Koncerne vian studadon de Esperanto: la Gardanto ne opinias konsilinde, ke vi tro okupiĝu pri la enkonduko de iuj ŝanĝoj en tiu lingvo, ĉar tio estas ne nur speco de aktiveco por kiu vi ne estas kvalifikita, sed tio ankaŭ por via baha laboro estas sen utilo aŭ avantaĝo, ĉar neniel certas ke Esperanto nepre evoluos al tiu internacia helplingvo pri kiu Bahá'u'lláh parolis en Siaj skriboj. (Letero de la 17a de Aprilo 1936)<sup>84</sup>

\*\*\*

Koncerne la studadon de Esperanto: fakte estus tre helpe se la geamikoj studus tiun lingvon – ne tiom pro ĝiaj eblecoj evolui al la internacia helpa lingvo de la estonteco (ni havas deklaron nek de Bahá'u'lláh nek de 'Abdu'l-Bahá dirante ke ĝi evoluos al tia lingvo) sed precipe pro ĝia utileco por la disvastigo de la Kredo. (Letero de la 5a de Majo 1936)<sup>85</sup>

\*\*\*

Koncerne la instruadon de Esperanto: la Gardanto plene aprezas viajn klopodojn je la disvastigo de tiu ĉi lingvo ... Li tamen petas min atentigi vin pri la fakto, ke nek Bahá'u'lláh nek 'Abdu'l-Bahá specife konstatis ke Esperanto certe fariĝos la internacia helpa lingvo de la estonteco, nek devigis ili la kredantojn instrui ĝin. Kion 'Abdu'l-Bahá ĉefe faris estis tre laŭdi ĝin kaj elmontri ĝiajn eblecojn. La instruado de Esperanto do ne estas ordono aŭ devo samsence kiel ekzemple preĝado. Kion Bahá'u'lláh dekretis estas aŭ la kreado de nova lingvo aŭ la adopto de unu el la ekzistantaj lingvoj por uzado kiel ilo de internacia

komunikado. Esperu ni ke iam Esperanto fariĝos tia komunikilo.

(Letero de la 26a de Decembro 1936)<sup>86</sup>

\*\*\*

Koncerne la temon Esperanto: estu klarigata al la kredantoj ke, kvankam 'Abdu'l-Bahá ofte stimulis la instruadon de tiu lingvo, estas mencio nek de Li nek de Bahá'u'lláh, kiu povas igi nin kredi ke ĝi nepre fariĝos la internacia helpa lingvo de la estonteco. Bahá'u'lláh precizigis en Siaj skriboj ke tia lingvo aŭ devos esti elektita el inter la ekzistantaj lingvoj aŭ estu iu tute nova kreata por servi kiel ilo de interŝanĝo inter la nacioj kaj popoloj de la mondo. Dum tiu fina elekto ankoraŭ farendas, estas konsilata al la bahaanoj studi Esperanton nur konsiderante la fakton, ke en la nuna etapo de la evoluado de la Kredo la lernado de tiu ĉi lingvo povas konsiderinde faciligi interkomunikadon inter individuoj, grupoj kaj Asembleoj tra la baha mondo.

(Letero de la 4a de Junio 1937)<sup>87</sup>

\*\*\*

Nun koncerne vian demandon pri la signifo de la citaĵo sur paĝo 25 de »La Epistolo al la Filo de l' Lupo«: la scienco tie aludita estas kaŝita en la kono de Bahá'u'lláh.

Koncerne la novan lingvon kaj skribon, kiujn Bahá'u'lláh mencias sur paĝo 107 de tiu sama libro: ni ne scias al kiu specifa lingva rimedo ili aludas.

Koncerne Esperanton: ne certas ĉu ĝi fariĝos la internacia helpa lingvo de la estonteco.

(Letero de la 9a de Aŭgusto 1937)<sup>88</sup>

\*\*\*

Vi plendas, ke la kredantoj en Ameriko ne sufiĉe grave traktas la studadon de Esperanto; tio eble veras kaj tiel estas parte pro tio ke ili ne plu kredas ke ĝi *nepre* fariĝos la internacia helpa lingvo de la estonteco. Ke la bahaanoj interesiĝas kaj devas interesiĝi pri tiu ĉi lingvo estas precipe pro la grava signifo de la ideo, kiun ĝi reprezentas, kaj ne la kredo pri ĝia *imamenta* valoro kiel taŭga kaj adekvata internacia esprimilo.

La bahaanoj fakte bonvenigas Esperanton kiel la unuan siaspecan eksperimenton en la moderna tempo. Ili plene simpatias kun la esperantistoj ĉar ili emfazas la nepran neceson de la kreado de internacia lingvo studenda de ĉiuj popoloj de la mondo aldone al iliaj respektivaj naciaj lingvoj.

La Gardanto mem estus ĝin lerninta, sed liaj okupoj estas tiom multnombraj kaj tiel sufokaj, ke tute ne eblas al li trovi la tempon por tion fari.

(Letero de la 24a de Oktobro 1937)<sup>89</sup>

\*\*\*

Unu aferon, tamen, laŭ la opinio de la Gardanto, la kredantoj devus zorge eviti en ĉiuj tiaj kontaktoj kun la esperantistoj: nome, doni al ili la impreson ke ili konsideras Esperanton kiel necese konstituanta tiun internacian helpan lingvon de la estonteco, kiun Bahá'u'lláh menciis kaj emfazis kiel nemalhaveblan elementon je la konstruado de la venonta Nova Monda Ordo.

Doni al ili tian falsan koncepton pri la vera bahaa sinteno rilate al la elekto de la estonta monda internacia lingvo estus ne nur ago malhonesta kaj mallojala rilate la Kredon, sed kondukus al gravaj miskomprenoj kaj misperceptoj kaj finfine al la rezulto ke ili kontraŭagus la efikon de iaj provizoraj akiroj aŭ avantaĝoj, kiujn povus gajni la Kredo

per tiaj asociiĝo kaj kontakto kun la esperantistoj.  
Kion la bahaanoj subtenas estas ne tiom tiu lingvo mem,  
sed la centra ideo kiun ĝi enkorpiĝas kaj inokulas; kaj nur  
restante firmaj en tia sinteno povos ili esperi starigi iajn  
fruktodonajn kaj daŭrajn kontaktojn kun la diversaj  
Esperanto-grupoj kaj -asocioj tra la mondo.  
(Letero de la 24a de Aprilo 1939)<sup>90</sup>

\*\*\*

Ni ne havas aŭtentikan fonton de 'Abdu'l-Bahá en kiu Li  
asertas ke Esperanto estos la universala lingvo de la estont-  
eco. Eble estos Esperanto, eble estos alia lingvo – ni ne scias;  
sed pro tio ke ni kredas tiel firme je la neceso de internacia  
lingvo, ni ĉiam avidas kunlabori kun la esperantistoj.  
(Letero de la 25a de Januaro 1943)<sup>91</sup>

\*\*\*

Rilate vian demandon pri la utileco de »Basic English«  
[Baza Angla] kiel internacia lingvo: Li ne tre bone konas  
ĝin, ĉar li estas tro okupita per la enorma kvanto da laboro  
tie ĉi plenumenda de li. Sed la malmulto kion li legis pri ĝi  
igas lin dubi ĉu ĝi iam taŭgos por plenumi la bezonojn de  
helpa lingvo.  
(Letero de la 30a de Junio 1944)<sup>92</sup>

\*\*\*

Pri la tuta demando de internacia lingvo kaj ĝia rilato al la  
Kredo: Ni, kiel bahaanoj, deziregas vidi adopton de uni-  
versala helpa lingvo kiel eble rapide; ni ne estas la  
protagonistoj de iu ajn specifa lingvo, kiu plenumu tiun  
rolon. Se la registaroj de la mondo interkonsentus pri

ekzistanta lingvo aŭ pri konstruita nova lingvo internacie uzenda, ni tutkore apogus ĝin, ĉar ni deziras vidi kiel eble rapide okazi tiun ĉi paŝon je la unuiĝo de la homaro.

Esperanto estas vaste uzata, pli ol iu simila lingvo, tra la tuta mondo, kaj la bahaanojn stimulis kaj la Majstro kaj la Gardanto lerni ĝin kaj traduki bahaan literaturon al ĝi. Ni ne povas esti certaj ke ĝi estos la elektita internacia lingvo de la estonteco; sed pro tio ke ĝi estas la plej disvastiĝinta, kaj oriente kaj okcidente, ni certe daŭrigu kunlabori kun ĝiaj anoj, lernu paroli ĝin kaj traduku bahaan literaturon al ĝi.

Li opinias ke vi povas esti certa ke la aserto de 'Abdu'l-Bahá, farita en Parizo, estis instigita per Lia percepto kaj saĝo kaj ne farita pro la opinio de iu ajn alia.

Kompreneble la mono de la Kredo ne estu elspezata por traduki kaj eldoni literaturon en internaciaj lingvoj kiuj ne havas menciindan sekvantaron!

(Letero de la 17a de Oktobro 1944)<sup>93</sup>

\*\*\*

Li opinias ke la temo de baha laboro en Esperanto en Germanio estas afero kiun vi devus trakti kun la Nacia Spirita Asembleo; ni bahaanoj ne pretendas ke Esperanto *estos* la helpa lingvo de la estonteco – sed, pro tio ke ni firme kredas je la neceso de helpa lingvo, ni volonte subtenas tiun ĉi laboron eldonante librojn en Esperanto kaj stimulantе la bahaanojn lerni ĝin se ili tion deziras.<sup>94</sup>

\*\*\*

Rilate vian demandon pri la esperantistoj: Dum multaj jaroj ili estas unu el niaj plej intimaj kontaktoj en Eŭropo, kaj multaj el ili fariĝis kredantoj. Ili laboras por unu el niaj plej grandaj principoj, kaj ni certe asociiĝu kun ili. En Ger-

manio la bahaanoj eldonis Esperantan revuon, kaj Martha Root reprezentis la Kredon ĉe Esperanto-kongresoj. Ni ne povas diri ke ni certas ke tiu ĉi lingvo estos la internacia, sed ni avidas vidi ĝin disvastiĝi, ĉar ĝi akcelas unuecon kaj interkompreniĝon. Ĉiarimede flegu vian kontakton kun ili. Ĉu Esperanto estos elektita kiel la internacia lingvo aŭ ne, tion ni ne povas diri, sed ni ja povas diri ke ni esperas ke ĝi disvastiĝos, ĉar ĝi ne multe malpli ol plenumas tiel noblan celon.

(Letero de la 5a de Aprilo 1947)<sup>95</sup>

\*\*\*

La Gardanto ofte instigis la bahaanojn ne nur asociiĝi kun la esperantistoj, sed lerni paroli Esperanton. Aliflanke, ni, kiel bahaanoj, ne povas oficiale pretendi ke ni kredas ke Esperanto devas fariĝi aŭ fakte fariĝos la universala internacia lingvo. Kio interesas nin estas ke iu lingvo fariĝu universale uzata por akceli pacon kaj kunlaboron inter la nacioj; ne gravas al ni kiu ĝi estos, same kiel ne gravas al ni kiu valutosistemo estos universale adoptata, ktp. Tio tamen ne signifas, ke la bahaanoj ne studu Esperanton kaj kunlaboru amike kun la Esperanto-Societo.

La esperantistoj devus kompreni ke ni estas religio, ne societo, kaj ke ni klopodas, laŭ la ĝeneralaj principoj kaj instrukcioj de nia Kredo, konduki al nova Monda Ordo. Tiusence ni estas ege liberalaj; ni ne favoras planojn de aliaj societoj, eĉ se iliaj celoj eble estas iurilate la samaj kiel la niaj; ni volonte kunlaboras kun ili, sed, escepte de niaj specifaj instruoj, ni ne klopodas igi aliajn adopti iun ajn specifan sistemon – kiel ajn progresema eble ĝi estas. Tio ĉi estas nia sinteno al Esperanto.

Estus neeble fari la oficialan bahaan korespondadon en Esperanto, ĉar la vasta plimulto de la bahaanoj tra la

mondo parolas aŭ la anglan aŭ la persan kaj la korespondado de la Gardanto estas en tiuj ĉi du lingvoj. Kiam ajn lingvo estos adoptita de la nacioj de la mondo kiel la internacia rimedo, sendube ankaŭ ni ĝin adoptos kaj uzos. Se estos ĝi Esperanto, tio plaĉos al ni pro nia daŭra kaj amika asociiĝo kun la esperantistoj kaj la granda kontribuo, kiun ilia lingvo jam faris por pli bona interkompreniĝo inter la popoloj. Tial la Gardanto povas nur ripeti kion ofte li diris: ke la bahaanoj studu Esperanton kaj kunlaboru kun tiu Societo, sed ke ni ne povas diri ke tiu ĉi estas la universala lingvo, kiun ni adoptos!  
(Letero de la 31a de Marto 1948)<sup>96</sup>

\*\*\*

Nek la Majstro, nek la Gardanto asertis ke la angla estos la universala lingvo.  
(Letero de la 25a de Marto 1949)<sup>97</sup>

\*\*\*





## V TEKSTOJ FARE KAJ NOME DE LA UNIVERSALA DOMO DE JUSTECO

Fundamenta manko de interkomunikado inter popoloj serioze subfosas la strebon al monda paco. Adopto de internacia helplingvo konsiderinde kontribuos al la solvo de tiu ĉi problemoj kaj postulas urĝegan priatenton.

*(La promeso de monda paco)*<sup>98</sup>

\*\*\*

Bahá'u'lláh preskribas la adopton de universala lingvo kaj skribo. Liaj Skriboj antaŭvidas du stadiojn en tiu ĉi procezo. La unua stadio konsistos el la elekto de ekzistanta aŭ inventita lingvo, kiu tiam estos instruata en ĉiuj lernejoj de la mondo kiel dua, helpa apud la gepatraj lingvoj. La registaroj de la mondo pere de siaj parlamentoj estas alvokataj efektiviĝi tiun ĉi gravegan leĝon. La dua stadio, en la fora estonteco, estos la fina adopto de unu sola lingvo kaj komuna skribo por ĉiuj surtere.

*(Noto 193 en La Kitáb-i-Aqdas)*<sup>99</sup>

\*\*\*

Por la Unuiĝintaj Nacioj, kiuj aktuale uzas ses oficialajn lingvojn, aŭ la elekto de unu el la ekzistantaj lingvoj aŭ la kreo de nova por la uzado kiel helpa lingvo en ĉiuj ĝiaj forumoj signifus konsiderindan avantaĝon. Tia paŝo jam de longe estas proponita de multaj grupoj, de la esperantistoj ĝis mem la Bahaa Internacia Komunumo. Krom al ŝparo de mono kaj simpligo de administraj procedoj tia paŝo signife kontribuos al la antaŭenigo de spirito de unueco.

Ni proponas la nomumon de altnivela komisiono kun

membroj venantaj el diversaj regionoj kaj el rilataj terenoj, inklude de lingvistoj, ekonomiistoj, socisciencistoj kaj homoj el edukado kaj la amaskomunikiloj, por komenci zorgan studadon de la afero de internacia helpa lingvo kaj adopto de komuna skribo.

Ni antaŭvidas, ke fine la mondo neeviteble devos adopti unu universale agnoskitan helpan lingvon kaj skribon por esti instruata en lernejoj tra la tuta mondo kiel suplemento al la lingvo aŭ lingvoj de ĉiu lando. La celo estas faciligi la transiron al tutmonda socio pere de plibonigita komunikado inter nacioj, reduktado de administraj kostoj por komerco, registaroj kaj aliaj envolvitaj en tutmondajn entreprenojn, kaj ĝenerala fortikigo de pli elkoraj rilatoj inter ĉiuj anoj de la homara familio.

Tiu ĉi propono estu konsiderata laŭlitere. Ĝi neniel imagas la rifuzadon de iu ajn vivanta lingvo aŭ kulturo.

*(Turnopunkto por ĉiuj nacioj)*<sup>100</sup>

\*\*\*

Kvankam pasos ankoraŭ jardekoj – aŭ eble multe pli da tempo – antaŭ ol la vizio entenata en tiu ĉi rimarkinda dokumento (La sep kandeloj de l' unueco) estos plene realigita, la esencaj trajtoj de tio kion ĝi promesis jam nun estas faktoj nekontesteblaj tra la mondo. Kaze de iuj el la grandaj ŝanĝoj antaŭviditaj – unueco rasa kaj unueco religia – la intenco de la vortoj de la Majstro estas klara kaj la tiurilataj procezoj estas tre progresintaj – spite de kiel ajn granda eble estas la rezisto kelkloke. Tio ĉi vastagrade validas ankaŭ rilate al lingva unueco. Ĝia bezono estas nun ĉiuflanke rekonata kiel montras la cirkonstancoj kiuj devigis la Unuiĝintajn Naciojn kaj grandan parton de la neregistara komunumo adopti plurajn »lingvojn oficialajn«. Ĝis decidiĝo fare de internacia interkonsento la efiko de tiaj disvolviĝoj kiel la interreto, la

mastrumado de aertrafiko, la formiĝo de diversspecaj teknikaj vortaroj, kaj la universala edukado mem, estas la iomgrada ebligo al la angla ŝtopi la breĉon.

(*Century of Light*)<sup>101</sup>

\*\*\*

Estas ricevita via letero de la 9a de 'Azamat 128, kiu esprimas vian opinion, ke apogo de internacia helpa lingvo por bahaaj kunvenoj fare de la Universala Domo de Justeco ne konsistigus antaŭjuĝon por iu estonta Monda Registaro rilate al ĝia elekto de monda lingvo por oficiala uzado, kaj ke Esperanto estas vaste uzata en klerikaj, komercaj kaj sciencaj kunvenoj.

Rilate vian unuan komenton: pro tio ke Bahá'u'lláh diris ke la Supera Domo de Justeco nomumos komitaton kiu studos la tutan aferon kaj tiam aŭ elektos unu el la ekzistantaj lingvoj aŭ kreos iun novan por funkcii kiel internacia lingvo, konsistigos tiu ago, kiam tia elekto estos farita, aŭtomate apogon de la helpa lingvo elektita.

Rilate al Esperanto ni dividas kun vi elĉerpon el letero skribita nome de la amata Gardanto fare de lia sekretario al individuo en 1937:

Ke la bahaanoj interesiĝas kaj devas interesiĝi pri tiu ĉi lingvo estas precipe pro la grava signifo de la ideo, kiun ĝi reprezentas, kaj ne la kredo pri ĝia *imanta* valoro kiel taŭga kaj adekvata internacia esprimilo.

La bahaanoj fakte bonvenigas Esperanton kiel la unuan siaspecan eksperimenton en la moderno. Ili plene simpatias kun la esperantistoj ĉar ili emfazas la nepran neceson de la kreado de internacia lingvo studenda de ĉiuj popoloj de la mondo aldone al iliaj respektivaj naciaj lingvoj.

Pri la plej taŭga momento por la elekto de internacia helpa

lingvo: ni opinias ke ne estas efektivebla por la Domo de Justeco nuntempe fari la elekton.  
(Letero de 8a de Junio 1971)<sup>102</sup>

\*\*\*

Responde al la sugesto en via letero de 11 Raĥmat, ke la vasta studado kaj uzado de la angla fare de la amata Gardanto povas esti »uzata kiel konfirmo de la uzo de la angla kiel universala helpa lingvo«, ni devas informi vin ke tia supozo estas sufiĉe nepravigebla.  
Nuntempe neniu povas diri, kiu estos la estonta internacia lingvo kaj/aŭ skribo.  
(Letero de la 20a de Julio 1972)<sup>103</sup>

\*\*\*

Ĉar la angla kaj la persa estas la du oficialaj lingvoj de la Universala Domo de Justeco, ni bedaŭras ke ni ne povas skribi al vi en Esperanto, sed ni ĝoje aldonas Esperanto-tradukon de nia letero por vi konsiderante ke vi ne bone komprenas la anglan. Ni esperas ke eblos al s-ro Habibullah Taherzadeh fari tiajn tradukojn, se lia tempo tion permesas.  
Rilate la demandon en via letero de 11 Jalál: estis nia kompreno de la celo de la Bahaa Esperanto-Ligo, kiam ni konsentis pri ĝia formado, ke ĝi estu oficiala ne-neŭtrala fako de la Universala Esperanto-Asocio konsistanta el tiuj esperantistoj kiuj estas ankaŭ bahaanoj, kun la celo stimuli kunlaboron inter tiuj geamikoj kaj diskonigi la bahaajn instruojn inter iliaj kunesperantistoj.  
Dum individuaj bahaaj esperantistoj estas, kompreneble, liberaj kuraĝigi siajn kunbahaanojn lerni Esperanton, tio ĉi ne estu aktivado de la Bahaa Esperanto-Ligo, kaj oni konsciis ke, dum estas klare ke la Bahaa Kredo apogas la

principon de internacia helpa lingvo, estas farita ĝis nun  
neniu decido pri tio, kiu tiu lingvo estos.

(Letero de Majo 1974)<sup>104</sup>

\*\*\*

Aldone al nia letero al vi de la 2a de Decembro 1974 kaj  
rilate al via demando pri la mondlingvo la Universala  
Domo de Justeco petis nin atentigi vin pri la konstato en la  
Oka Folio de la Ekzaltita Paradizo (en *Bahá'í World Faith*, p.  
182): »Antaŭe deklaris Ni, ke estis dekretite ke oni parolu  
en du lingvoj kaj klopodu ilin redukti al unu.«

Kiam iu kredanto demandis la amatan Gardanton pri la  
signifo de tiu ĉi citaĵo, lia sekretario nome de li donis la  
sekvan respondon:

Kion Bahá'u'lláh aludas en la Oka Folio de la  
Ekzaltita Paradizo estas tre fora tempo, kiam la  
mondo estos vere unu lando kaj unu lingvo estos  
reala ebleco. Tio ne kontraŭdiras Liajn instrukciojn  
rilate la bezonon de helpa lingvo.

(Letero de la 29a de Decembro 1974)<sup>105</sup>

\*\*\*

La Universala Domo de Justeco instrukciis nin diri  
responde al la letero de s-ro ... al la Loka Spirita Asembleo  
de ... ke li estu informita, ke por la Universala Domo de  
Justeco ankoraŭ ne venis la tempo fari ian tian paŝon kian  
li proponas. Estas ekster ĉia dubo la nepra graveco de la  
enkonduko de universala lingvo kaj tio neeviteble efektivi-  
ĝos, sed la kredantoj devas nuntempe okupi sin pri pli  
urĝaj aferoj kaj estas ili petataj koncentriĝi je la instruado  
de la Kredo kaj atingi la celojn de la Kvinjara Plano.

(Letero de 2a de Marto 1976)<sup>106</sup>

\*\*\*

La Universala Domo de Justeco konscias, ke foje vi devas fronti iom embarasajn situaciojn rilate al viaj kunesperantistoj, ĉar, kiel bahaanoj, vi estas plene konsciaj pri tio ke povas bone esti ke, malgraŭ siaj sendubaj kvalitoj, Esperanto ne estos la internacia lingvo kiu fine elektiĝos, kaj ke estas la ideo de internacia lingvo kiun la bahaanoj entuziasme subtenas kaj ne iun specifan solvon de la problemo.

La averto de la Gardanto, ke bahaanoj devas esti plene sinceraj pri tiu ĉi afero rilate al esperantistoj por tiel eviti seriozajn miskomprenojn kaj konfuzojn en la estonto, sendube multe asistos vin en via laboro kaj ebligas al vi antaŭeniri kun plena entuziasmo, sen iamaniere fari la impreson de velado sub falsaj flagoj.

(Letero de 6a de Oktobro 1976)<sup>107</sup>

\*\*\*

Estas ricevita via letero de la 23a de Majo al la Universala Domo de Justeco rilate proponitan solvon por universala helpa lingvo, kaj ni estas petataj transdoni ĝian respondon.

La ideo ke iu formo de signolingvo povus plenumi la postulojn de universala helpa lingvo ne estas nova por tiuj studentaj lingvojn kaj homan komunikadon, kiuj studis multajn alternativojn. Sufiĉu diri ke la limoj de signolingvoj ege superas iliajn evidentajn meritojn – kiom ajn allogaj iuj aspektoj de tiaj sistemoj eble estas. Kiel ajn, ankoraŭ ne venas la tempo por la adopto de la universala lingvo postulata de la Kredo, kvankam estas oportune daŭrigi la preparajn studojn, kiuj povas esti la bazo por racia internacia interkonsiliĝado kaj finfine adopto de unu lingvo por la mondo.

Vi sendube konscias ke estas multaj bahaanoj kiuj estas entuziasmoj de la mondlingvaj movadoj, inter ili multaj

kiuj estas esperantistoj. Pere de niaj agadoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj la bahaanoj atente observas ĉiujn iniciatojn kiuj povos konduki al tiu ĉi fundamenta celo de komuna lingvo por monda socio.

La Domo de Justeco stimulas la interesiĝon de la kredantoj pri ĉiuj grandaj principoj de la Kredo kiuj kune finfine kondukos al monda unueco, kaj ĝi esperas ke via zorgo por la Kredo de Dio estos daŭre stimulata al tiaj fruktodonaj direktoj.

(Letero de 6a de Julio 1977)<sup>108</sup>

\*\*\*

Vi tute pravas asertante ke en la Sanktaj Tekstoj estas du malsamaj klaŭzoj por la elekto de Internacia Helpa Lingvo. Unuflanke tiu ĉi tasko estas asignita al la registaroj de la mondo, aliflanke ĝi estas asignita al la Domo de Justeco. Ne eblas nun antaŭvidi precize kiel tio okazos, sed ŝajnas esti racie supozi ke longe antaŭ ol la bahaa komunumo estos sufiĉe granda aŭ havos la aŭtoritaton efektiviĝi tiel mondampleksan ŝanĝon, la eventoj devigos la registarojn, ĉu unu post alia aŭ ĉu ĉiujn kune, elekti Internacian Helpan Lingvon instruendan kiel duan lingvon en ĉiuj lernejoj kaj uzendan en la tuta internacia komerco. Je ege pli posta stadio, eble dum la tempo de la Bahaa Monda Konfederacio, la Universala Domo de Justeco eble decidus revizii la situacion kaj aŭ konfirmi la decidon faritan de la registaroj aŭ ŝanĝi la elekton al lingvo pli taŭga.

Kompreneble la cirkonstancoj povas rezultigi evoluon tre malsaman ol la ĵus skizitan. Unu el la ecoj de la Bahaa Administracio estas ĝia fleksebleco, kiu ebligas al ĝi trakti evoluojn neantaŭviditajn kaj cirkonstancojn daŭre ŝanĝiĝ-antajn. La sole certa aspekto rilate la elekton de Internacia Helpa Lingvo estas ke la Universala Domo de Justeco ne

konsideras la nuntempon taŭga por ke ĝi entrepenu iujn tiurilatajn paŝojn.

(Letero de la 8a de Junio 1980)<sup>109</sup>

\*\*\*

Ankoraŭ ne estas oportune ke la Universala Domo de Justeco faru deklaron favore al iu specifa lingvo – en tiu ĉi specifa kampo nun la precipa afero estas ke la bahaanoj subtenu la principon. Lerni Esperanton aŭ alian el la proponitaj helpplingvoj donas kontakton al homoj el la tuta mondo, kiuj konscias pri la neceso, havas internaciisman sintenon kaj eble estas altirataj al la Kredo. Tial, se vi aparte interesiĝas pri tiu ĉi temo kaj emas lerni Esperanton, ne hezitu fari tion.

(Letero de la 2a de Junio 1982)<sup>110</sup>

\*\*\*

La malfacilaĵoj de internacia komunikado en multlingva mondo estas frape evidentaj al iu ajn bahaano, kiu faris instruvojaĝojn al fremdaj landoj aŭ partoprenis internaciajn konferencojn. La Universala Domo de Justeco opinias ke, se ĝi elektus iun lingvon uzendan por la bahaanoj kiel internacia helpa lingvo, tio nuntempe kaŭzus pli da malfacilaĵoj ol per tio solviĝus. La geamikoj tamen, memorante ke tio ĉi estas unu el la tre gravaj principoj de la Kredo, farus bone se ili apogus la koncepton kiam ajn eblas kaj preĝus ke la tempo ne estu tre fora kiam la registaroj de la nacioj adoptos ununuran lingvon instruendan en ĉiuj lernejoj de la mondo kiel helpan apud la gepatra lingvo de la lernantoj.

*(The Principle of an International Auxiliary Language)*<sup>111</sup>

\*\*\*



Rilate viajn demandojn pri universala helpa lingvo kaj monda skribo la Domo de Justeco petas nin diri, ke ĝi scias pri nenio en la leteroj aŭ skribaĵoj de Shoghi Effendi pri la kreado de ortografio por internacia helpa lingvo aŭ pri traktato pri la araba kiel ebla tia lingvo.  
(Letero de la 26a de Marto 1986)<sup>112</sup>

\*\*\*

Malgraŭ ĝiaj kvalitoj, tamen, kaj malgraŭ ke la bahaanoj estas instigataj ĝin studi, Esperanto ne povas kun certeco esti akklamata kiel la internacia lingvo kiun la popoloj de la mondo fine adoptos ...

Por ĝia propra uzado la Universala Domo de Justeco adoptis la du lingvojn plejparte uzatajn de la amata Gardanto, nome la anglan kaj la persan. Ĝi ankaŭ havas tradukistojn kiuj disponigas tradukojn de ĝiaj leteroj al la hispana kaj la franca por la kredantoj en la grandaj regionoj de la mondo kie tiuj ĉi du lingvoj dominas. Ĝis nun la Universala Domo de Justeco opiniis ke la enkonduko de internacia helpa lingvo ene de la baha komunumo por la de vi priskribitaj celoj tro ŝarĝus la kredantojn, el kiuj multaj jam estas devigataj lerni unu aŭ pli da fremdaj lingvoj por agadi en la socioj en kiuj ili vivas.  
(Letero de la 17a de Junio 1986)<sup>113</sup>

\*\*\*

Ni opinias ke enkadre de siaj klopodoj akceli pacon la bahaanoj de Eŭropo bone farus pliigante sian kunlaboron kun la Esperanto-Movado, kaj ni instigas bahaanojn kiuj emas helpi tiutere lerni Esperanton kaj aktive partopreni la agadojn de la Movado. Kiel vi scias: kvankam kaj 'Abdu'l-Bahá kaj Shoghi Effendi klarigis ke neniel certas ke Esperanto fine elektiĝos kiel la internacia helpa lingvo de

la mondo, 'Abdu'l-Bahá stimulis la geamikojn en Oriento kaj Okcidento ĝin lerni kiel praktikan paŝon je la akcelado de la koncepto adopti internacian helpan lingvon por disfaligi la barilojn je la interkompreniĝo inter popoloj.

Tiel, ĉar la sekvantoj de Bahá'u'lláh kunlaboras kun multaj diversaj individuoj kaj asocioj antaŭenigante projektojn por socia kaj ekonomia evoluado kaj cele al la firmigo de monda paco, kelkaj el ili sin dediĉu al aktiva kunlaborado kun la esperantistoj, kiuj, kiel ili konstatos, kunhavas kun ili multajn idealojn.

(Letero de la 17a de Septembro 1986)<sup>114</sup>

\*\*\*

Nome de la membroj de la bahaa komunumo en ĉiu lando ni sendas al vi, kaj pere de vi al ĉiuj membroj de Universala Esperanto-Asocio, niajn elkorajn gratulojn okaze de la proksimiĝanta centjara jubileo de Esperanto.

La kreadon de Esperanto plenkore bonvenigis 'Abdu'l-Bahá kiel signifan paŝon je la instalado de internacia helpa lingvo, kiun estis postulinta Bahá'u'lláh, la Fondinto de la Bahaa Kredo, kaj ĝia daŭra progreso estas grava ero de tutmonda akcepto de la unueco de la homaro – kaj praktike kaj teorie.

Vian faman fondinton, d-ron Ludwig Zamenhof, honoras bahaanoj en ĉiu lando pro kaj lia grandioza atingo krei Esperanton kaj ankaŭ liaj profunde sentitaj homamaj idealoj. La akcepto de la Bahaa Kredo de lia filino Lidia cementis eĉ pli firme la ligojn de intima asociiĝo inter niaj du movadoj. Tial ni ĉi-momente ĝojegas kun vi ĉiuj kaj sendas al vi niajn plej varmajn bondezirojn por la daŭra kaj kreskanta sukceso de ĉiuj viaj streboj.

(Letero de la 30a de Junio 1987)<sup>115</sup>

\*\*\*

Rilate vian demandon pri la ebleco ke la angla fariĝos la universala helpa lingvo la Universala Domo de Justeco, en ĝia respondo datita la 20an de Julio 1972 al individua kredanto, kiu sugestis ke la vasta studado kaj uzado de la angla lingvo fare de la amata Gardanto povus esti konsiderata kiel konfirmo ke tiu ĉi lingvo uziĝos kiel la universala helpa lingvo, konstatis ke tia supozo estas tute nepravigebla kaj ke aktuale neniu povas diri, kiu estos la estonta internacia lingvo kaj/aŭ skribo.  
(Letero de la 2a de Aŭgusto 1990)<sup>116</sup>

\*\*\*

Kvankam la Universala Domo de Justeco aprezas la grandan valoron, kiun havas Esperanto por internacia komunikado, kaj la ege signifan rolon, kiun ĝi ludis kaj sendube daŭre ludos por la laboro instrui la Kredon ..., ĝi ne konsideras konsilinde efektivi la rekomendon de s-ro ... .  
La bezono adopti internacian helpan lingvon evidente urĝas kaj estis ofte emfazata de Bahá'u'lláh. Tamen, la Domo de Justeco nuntempe ne estas en pozicio indiki ke iu aparta lingvo adoptiĝu. Malgraŭ tio, pro la multaj intimaj asociiĝoj inter la bahaaj komunumo kaj la Esperanto-movado, kiuj ekzistas de multaj jardekoj, kaj konsiderante la eksterordinaran progreson faritan de Esperanto la Domo de Justeco bonvenigis la formiĝon de Bahaaj Esperanto-Ligo kaj de tiaj naciaj bahaaj Esperanto-asocioj kiel BELusono, kies membroj tra siaj multaj kaj vastaj agadoj faras elstarajn servojn je la konsciigo pri la bezono de internacia helpa lingvo, je la demonstrado de ĝia efikeco kaj samtempe je la disvastigado de la mesaĝo de Bahá'u'lláh inter tiom da homoj de diversaj devenoj kaj fonoj, kiujn inspiras la sama universala ideo.  
(Letero de la 21a de Decembro 1990)<sup>117</sup>

\*\*\*

Kvankam sendube la angla lingvo estas vaste akceptita kiel internacia komunikrimedo, aparte en negocado kaj komerco, scienco kaj teknologio, same kiel en internaciaj aferoj, ĝi ne estas adoptita de la mondo kiel la internacia lingvo.

Responde al simila demando nia departemento ricevis la instrukcion elmontri ke estas du malsamaj klaŭzoj en la Sanktaj Tekstoj pri la elekto de internacia helpa lingvo, nome, ke unuflanke tiu ĉi tasko estas asignita al la registaroj de la mondo, kaj ke aliflanke ĝi estas asignita al la Universala Domo de Justeco, kiel indikite en la sekvaj citaĵoj:

En la Tabelo de Bishárát Bahá'u'lláh deklaras la jenon: »Estas devo de la suverenoj de la mondo – Dio ilin helpu – aŭ de la ministroj de la tero interkonsiliĝi kaj adopti iun el la ekzistantaj lingvoj aŭ iun novan por ke estu ĝi instruata al la infanoj en la lernejoj tra la tuta mondo, kaj same unu skribmanieron. Tiel la tuta tero estos konsiderata kiel unu lando.«

En la Tabelo de Ishráqát Li deklaras: »En antaŭaj Epistoloj komisiis Ni al la Konfiditoj de la Domo de Justeco aŭ elekti iun lingvon el inter tiuj nune ekzistantaj aŭ adopti novan, kaj same ankaŭ elekti komunan skribmanieron, ambaŭ instruendaj en ĉiuj lernejoj de la mondo. Tiel la tero estos konsiderata kiel unu lando kaj unu hejmo.«

Rilate la unuan citaĵon ne estas dubo ke aktualaj kaj estontaj eventoj certe devigos la registarojn de la mondo adopti internacian lingvon. Rilate la duan citaĵon: ankoraŭ ne venis la tempo por la Universala Domo de Justeco fari tiurilate iujn deklarojn.

(Letero de la 5a de Septembro 1991)<sup>118</sup>

\*\*\*

Per tio ĉi danke estas konfirmata la ricevo de via letero datita la 29an de Decembro 1993 kaj de la kunsenditaj

materialoj pri la internacia lingvo Glosa. Ni estas petitaj doni la sekvan respondon.

Kiel vi jam konscias la Universala Domo de Justeco faris neniujn deklarojn pri tio, kiu lingvo estos elektita kiel la internacia helpa lingvo adoptenda de la popoloj de la mondo. Eĉ rilate la ege videblan internacian lingvon Esperanto 'Abdu'l-Bahá kaj Shoghi Effendi instigis la kredantojn apogi ĝiajn asociojn ne pro tio ke la bahaanoj opinias ke ĝi estos elektita kiel la helpa lingvo, sed ĉar ni pledas por la principo de la bezono de tia lingvo en la estonta mondcivilizacio.

Dum tial la bahaanoj estas liberaj engaĝiĝi en iniciatoj kiel Glosa aŭ similemaj asocioj, kiuj celas apogi la ideon de internacia helpa lingvo, ili ankaŭ sendube volos pesi la tempodediĉon, kiun tia engaĝiĝo implicus, kontraŭ la eblecoj, kiuj iliaopinie rezulte de tio montriĝos por peri la Kredon de Bahá'u'lláh al homoj kiuj nature inkliniĝas al la koncepto de unuigita mondo.

(Letero de la 12a de Januaro 1994)<sup>119</sup>

\*\*\*

Krei mondan lingvon sendube postulus enorme ampleksan esploradon kaj la Domo de Justeco ne opinias ke estas oportune, pro la premaj taskoj de la Kvarjara Plano, ĝenerale alvoki la bahaanojn sin ŝarĝi per klopodo kian vi priskribis kaj kiu provas solvi aŭ trakti iujn el la praktikaj aspektoj rilate tian entreprenon. Pli urĝas la neceso apogi la principan ideon de internacia helpa lingvo.

(Letero de la 11a de Novembro 1996)<sup>120</sup>

\*\*\*

... la Esplordepartemento opinias ke povus esti adekvate emfazi kelkajn punktojn en letero datita la 8an de Junio

1980 kaj skribita nome de la Universala Domo de Justeco ... El zorga legado de tiu tekstero ni ĉerpis la sekvajn punktojn, kiujn la Ligo eble emas reekzameni:

- La procezo kondukanta al la fina elekto de la Internacia Helpa Lingvo tre eble pasos tra stadioj.
- La unua stadio eble koincidos kun la periodo »longe antaŭ ol la baha komunumo estos sufiĉe granda aŭ havos la aŭtoritaton efektiviĝi tiel mondampleksan ŝanĝon«, kiam verŝajne estos »eventoj« (kaj ne la bahaanoj) kiuj »devigos« registarojn elekti Internacian Helpan Lingvon instruotan kiel dua lingvo en lernejoj kaj uzotan en »internacia komerco«.
- Dum tiu ĉi unua stadio, registaroj eble elektos tiun ĉi lingvon »ĉu unu post alia aŭ ĉu ĉiuj kune«.
- Dua »ege pli posta« stadio ankaŭ estas aludita: »eble dum la tempo de la Baha Monda Konfederacio« kiam la Universala Domo de Justeco »eble decidis revizii la situacion kaj aŭ konfirmi la decidon faritan de la registaroj aŭ ŝanĝi la elekton al lingvo pli taŭga«.
- Alia punkto farita en la supre citita elĉerpaĵo, kiu ŝajnas esti signifa tiurilate, estas ke dum »la cirkonstancoj povas rezultigi evoluon tre malsaman« ol tiun skizitan tie ĉi, estas la »fleksebleco« de la baha administracio »kiu ebligas al ĝi trakti evoluojn neantaŭviditajn kaj cirkonstancojn daŭre ŝanĝiĝantajn«.

Laste, la Universala Domo de Justeco »ne konsideras la nuntempon taŭga por ke ĝi entrepenu iujn ... paŝojn« rilate al la Internacia Helpa Lingvo.

(Memorando de la Esplordepartemento, 1997)<sup>121</sup>

\*\*\*

## VI TEKSTOJ EL DIVERSAJ FONTOJ<sup>122</sup>

*[Noto de la tradukintoj: En la sekvaj citaĵoj, el kiuj kelkaj venas el tre malnovaj fontoj, la literumado de persaj kaj arabaj vortoj estas unuformigita laŭ la sistemo enkondukita de Shoghi Effendi kaj hodiaŭ ĝenerale uzata de bahaaj institucioj kaj aŭtoroj.]*

La deka principo estas la starigo de universala lingvo por ke estonte ni ne devu akiri tiom da lingvoj. En lernejoj oni studos du, la denaskan lingvon kaj la internacian helpan lingvon. La uzado de internacia helpa lingvo fariĝos granda rimedo por malaperigi la malkonsentojn inter nacioj.

(Atribuita al 'Abdu'l-Bahá)<sup>123</sup>

\*\*\*

Oni demandis Lin ['Abdu'l-Bahá] ĉu eble la araba fariĝos la universala lingvo. Li respondis ke ĝi ne fariĝos. Tiam oni demandis Lin pri Esperanto. Li respondis:

Antaŭ kelkaj semajnoj mi skribis leteron el Novjorko al unu el la pledantoj por Esperanto dirante al li, ke tiu ĉi lingvo povus universaliĝi se konsilio de delegitoj elektitaj el inter la nacioj kaj regantoj estus establita, kiu pridiskutus Esperanton kaj konsiderus la rimedojn por antaŭenigi ĝin.

(Atribuita al 'Abdu'l-Bahá)<sup>124</sup>

\*\*\*

Ni observas ke hodiaŭ estiĝas la rimedoj por unueco. Tio en si mem evidentigas, ke la diaj konfirmoj estas kun ni. Unu el la principoj de la unueco de la homa mondo estas la invento de la universala helpa lingvo. ... Ni observas, ke tiu ĉi lingvo [Esperanto] disvastiĝas ĉiutage, kaj ĝiaj proponantoj plimultiĝas. Ne dubebblas, ke la universala helpa lingvo grave rolos je la forviŝado de la aktualaj miskomprenoj kaj je tio, ke ĉiu individuo povos informiĝi pri la ideoj de la tuta homaro.

Tial ni ĉiuj devas strebi disvastigi tiun ĉi lingvon inter niaj kunuloj. Tiu ĉi internacia helpa lingvo estos enkonduko al stablo de la unueco de la homaro. La plej grandaj klopodoj devas esti farataj ĉi-direkte.

(Atribuita al 'Abdu'l-Bahá)<sup>125</sup>

\*\*\*

#### VIZITO AL 'ABDU'L-BAHÁ

*»Laŭ kia maniero, – mi demandis lin ['Abdu'l-Bahá], – vi opinias, ke internacia lingvo helpas al la komuna paco?«*

»Dank' al la plifaciligado de la internaciaj rilatoj. Kiam la homoj pli bone konas unu la alian, ili ankaŭ pli profunde interkompreniĝos. Ili konstatos, ke sub diversaj vestoj, la homoj estas la samaj, ke niaj religioj havas multon komunan: la Mahometanoj ekzemple estas multe pli proksimaj al la Kristanoj, ol oni ĝenerale opinias. Pro la diferenco de la lingvoj ni vidas precipe la diferencon de la kredoj, de la kutimoj, de la deziroj, sed kiam ni havas apud niaj gepatraj lingvoj, duan komunan lingvon, ni vidos ankaŭ la veran, esencan similecon inter ĉiuj. En Oriento, ekzemple, kaj en Norda Afriko, la komuneco de la araba lingvo forigis grandparte la antaŭan malkonfidon, la malpacon, kiu rezultis precipe de la diverseco de la lingvoj.



Same okazos, kiam ĉiuj nacioj kaj rasoj povos uzi saman lingvon.«

»Ĉu la Orientanoj facile lernas Esperanton?«

»Jes. Ili sufiĉe rapide lernas la anglan aŭ la francan lingvon, kial do ili trovas grandajn malfacilaĵojn en Esperanto, kiu estas multe pli facila?«

»Ĉu vi opinias, ke la Bahaanoj bonvolos lerni nian lingvon laŭ via konsilo?«

»Jes. Tio kompreneble ne povas esti por ili la ĉefa afero. Sed ĉar ili komprenos la gravecon de komuna lingvo por la efektivigo de nia idealo, ili certe obeos mian ordonon kun ĝojo kaj laboros por la disvastigo de Esperanto ne nur en Oriento, sed ankaŭ en la Unuigitaj Ŝtatoj de Ameriko, kie niaj disĉiploj estas multnombraj.«

»Ĉu vi jam renkontis multajn Esperantistojn dum via vojaĝo?«

»Jes. Tre afable ili akceptis min en Edinburgo kaj antaŭ du-tri tagoj tie ĉi mem, en Parizo. Mi nun intencas veturi Germanujon, kie verŝajne mi ankaŭ vizitos ilin. Ili estas al mi tre simpatiaj.«

»Alia afero: Kia devas esti nia sintenado kontraŭ maljustaj atakoj? Ĉu ni devas silenti aŭ ilin rebati?«

»Ni simple devas diri la veron, sed neniam ataki kaj precipe neniam ajn serĉi personan venĝon. Se mian filon iu mortigus, mi tute ne rajtus mortigi la krimulon. Devo de la socio, ne de la individuo, estas fari justecon per puno.«

»Sed, se la socio restas indiferenta?«

»Ni devas pace atendi. Fine la vero, la bono, la justeco venkos kaj la paco triumfos!«

Ĉe tiuj ĉi vortoj mi petis forpermeson. 'Abdu'l-Bahá min adiaŭis, amike dankante min por mia simpatio al sia juna samlandano, ĉar, kvankam persekutita en sia patrujo, »ĝin li amas tutkore«.

(Cart, *Vizito al Abdul Baha*)<sup>126</sup>

\*\*\*

... Fraŭlino Str.: »'Abbás Effendi ['Abdu'l-Bahá], ĉu mi rajtas submeti al la Majstro de la bahaanoj la demandon: Kial Via profeto Bahá'u'lláh rekomendis al Siaj adeptoj apud la respektiva gepatra lingvo ankoraŭ mondan unuecan lingvon, ĉu estas Volapuko aŭ Esperanto aŭ kiel ajn nomiĝas ĉiuj tiuj artfaritaĵoj? Ĉu ne nia angla jam estas vera mondlingvo? En la brita Regno la suno ne subiras! Per sole la »angla« oni povas vojaĝi tra kvin kontinentoj ne bezonante alian lingvon! Pro kio do la homaro ankoraŭ bezonas penadi malfacilan artan lingvon lerni apud la gepatra lingvo kaj apud la angla mondlingvo?«

'Abbás Effendi: »Ho mia fratino, el via buŝo parolas la enorma fiero de l' brito. Nur pripensu vi, ĉu ne ĉiu homo amas la lingvon de sia tribo, de sia popolo, la lingvon de siaj prapatroj, la gepatran lingvon de sia hejmlando? Vi bone scias kiel granda estas la potenco de lingva interkompreniĝo – vi mem fieras ke sole per la »angla« oni povas travojaĝi ĉiujn kontinentojn! Do, por la mondpaco, la mondunueco komuna ligo de idea interkompreniĝo, t.e. unueca lingvo estas urĝe necesa, pri tio samopinias doktuloj kaj laikoj de ĉiuj nacioj. Sed se nia sanktigita Perfekteco Bahá'u'lláh – laŭdata estu Lia memoro – estus rekomendinta jam ekzistantan lingvon, kiel vian anglan, tiam ĝuste reprezentantoj de kulturnacioj: germanoj, francoj, italoj, hispanoj, la slavo, la hungaroj k.t.p. kontraŭstarus tion, sed eĉ pli la reprezentantoj de la orientaj popoloj. Ni, ili dirus, ne volas lerni jam ekde infanaĝo la lingvon de la mondkonkerantoj; per tio ni jam anticipe kliniĝas sub la britan jugon, kiun ni volas je iu fora tago forĵeti.

Ĉu mi tion klarigu al vi per nia belega persa gepatra lingvo? Nu, aŭdo do miaj amikinoj:

Nia plej malnova lingvo estas la »Zendo«, kiu estas proksime parenca al la hinda sanskrito. En la »Zendo« estas skribita la sanktaj libroj de la »Avesto« [libro de instruoj de Zaratuštro]. Dum la historia periodo de la Partoj de 400 a.K. ĝis 300 p.K. (do dum la »malhelaj 700 jaroj«) la prahonora lingvo de la »Avesto« disfalas. La »Zendo« dissolviĝas en miksaĵo kun najbaraj lingvoj. Sub la regado de la Sasanidoj la aramea lingvo de Proksima Oriento repuŝas ĉiujn aliajn lingvomiksaĵojn kaj ligas sin kun la malnova persa al nova lingvokreaĵo, la »Pahlavi« aŭ »Husvareš«, kiu iĝis la vivanta popollingvo de la tuta meza kaj okcidenta persa regno. En orienta Persio la malnova persa lingvo pli bone defendis sin kontraŭ la enpenetranta aramea lingvo-elemento – ĝi evoluis al la »parsia«, al la efektiva familiara lingvo, al la novpersa. Eĉ la araba fremdregado, kiu per la instruoj de la profeto Mahomedo forpremis la praan zaratuštran Kredon de la adorantoj de lumo kaj fajro, ne sukcesis malebligi la reekfloradon de la nacia lingvo de la persa kulturo. Tiel longe kiel regis la persa lingvo de Pahlavi kaj de la parsia, tiel longe ankaŭ floradis la nacia epiko kaj la persa Sirili en origina kaj senmakula pureco. Sed en la 11-a jarcento la araba lingvo pli kaj pli enpenetris en la administracion kaj en la pli altan socion de la kortegoj, la doktuloj kaj la komercistoj. La araba estis la sankta lingvo, la mondlingvo de Islamo, la korlingvo de la profeto Mahomedo, la Sendito de Dio. Ĉu ne la anĝelo de la Plej Alta, Gabrielo, en la araba lingvo komisiis al la Sanktulo de Dio, al la profeto Mahomedo, Lian mondmision, la proklamon de la »Ununura Dio«? La niveliga forto de lingvomiksaĵo, de la enpenetrado de la arabaj elementoj en la persan ekde nun evidentiĝis. Baldaŭ post la brila persa lumo Ferdoŭsio perdiĝas la pureco de la persa lingvo, kiu alprenas multnombrajn arabajn fremdvortojn, kiujn ĝi naciigas kaj asimilas nur tra la daŭro de

jarcentoj - malutile al la persa epiko kaj liriko. Vestita en la lingvomantelo de la moderna persa-araba, la pura poezio fariĝas laŭmoda rimado, kortega servila flatado; en ekstere bela formo prezentiĝas senenhavo. Ho miaj amikinoj! Ni ne trompu nin: La lingvo estas la plej profunda karakterizaĵo de popolo, la lingvo ja estas la vesto de la popolspirito, la lingvo estas mezurilo de la kulturgrado de nacio. Trokreskanta lingvomiksado baldaŭ ekefikas sur la arto kaj poste la moralo de popolo.

Kio estas barbareco? Barbareco estas la nelimigita regado de senbridaj instinktoj! Se la popollingvo montras senbridecon kaj arbitrecon, subiĝon sub la materiaj kaj spiritaj konkerantoj kaj venkantoj, tiam ĝi fariĝas tombo-sonorado de la libereco de popolo! La spirita historio de ĉiu popolo, ĉu estas ĝi okcidenta aŭ orienta, antikva aŭ moderna, tion pruvas. La renaskiĝo de popolo, la regajno de ĝia libereco komenciĝas per la disciplinado kaj flegado de ĝia lingva heredaĵo. Popolo kiu malbeligas sian plej propran lingveston per pruntitaj falsbrilaĵoj de fremda lingvo vivos - ne, vegetos - sur degenera linio. Se la Benita Perfekteco Bahá'u'lláh rekomendas mondlingvon, tiu universala lingvo ne malheligu aŭ forpremu la miraklon de la propra lingvo. Ni, la persaj bahaanoj, volas nek rezigni pri nia propra dum jarmiloj evoluinta lingvo, la vivanta atesto de niaj bataloj kaj suferoj, de niaj spiritaj malvenkoj kaj venkoj, nek ĝin trudi al aliaj.

Atentu vi, filinoj de Okcidento: La flegado de la propra gepatra lingvo estas servado al la gefratoj de la propra popolo. Lernado kaj uzado de universala mondlingvo, ekz. de Esperanto, estas servado al la gefratoj de la homaro.

La propra lingvo estas la hejma aero, kiun ni bezonas en vivo kaj morto, kiu nin ĉirkaŭas de la lulilo ĝis al la tombo, kiu estas kaj restos nia plej persona posedaĵo. La universala mondlingvo estas komparebla kun ponto al la cetera

mondo, kun vaporĉevalo de la trafiko, kun aerŝipo por transporti homojn kaj varojn.

Se rezignas vi, ho homo, pri la propra, gepatra lingvo, tiam vin forlasos kredo, amo kaj espero, tiam de vi fuĝos artoj kaj sciencoj, tiam malaperos justu kaj leĝo, moralo kaj etiko.

Kio fakte kaj vere faras la judojn senhejmaj en la vasta mondo estas la perdo de ilia hebrea gepatra lingvo. Tial ili komencas sian nacian rekonstruon per la revivigo kaj reenkonduko de sia hebrea gepatra lingvo! Ho, miaj amikinoj de Okcidento: La gepatra lingvo estas kaj ĉiam estos la mastrino en la domo de popola kulturo, la universala mondlingvo rajtas esti kaj ĉiam estos nur la obeema kaj utila servantino de sia superula mastrino.«

Alláh' u' Abhá! – Kun la bahaa saluto la Majstro foriris.

(Dr. J. Fallscheer, *Aus dem Schatz der Erinnerungen an 'Abbás Effendi*)<sup>127</sup>

\*\*\*

Preskaŭ du horojn ni veturadis. Plejparte pluvis, sed la kamparo bele ekverdiĝis. 'Abdu'l-Bahá instruis al mi kelkajn vortojn de la persa, kaj mi instruis al Li kelkajn de Esperanto!

(Momen, *D-ro John Ebenezer Esslemont*)<sup>128</sup>

\*\*\*

Aldone al tio li [Shoghi Effendi] dum la fruaj jaroj de sia Gardanteco kiam Esperanto rapide disvastiĝadis – aparte en Eŭropo – dediĉis multan atenton al stimulado de la eldonado de la Bahaa Esperanto Gazeto, klarigante al ĝia redaktoro ke lia interesiĝo fontis el »mia granda deziro akceli en tiaj partoj de la bahaa mondo, kie la nunaj

cirkonstancoj tion permesas, la studadon de internacia lingvo«.

(Rabbání, *Priceless Pearl*)<sup>129</sup>

\*\*\*

Aldone al tiuj ĉi personaj rilatoj Shoghi Effendi havis multe pli da kontakto kun certaj nebahaaj organizaĵoj ol oni ofte supozas. Tio ĉi validis aparte pri la esperantistoj, kies tuta celo estis efektiviĝi la plenumon de la bahaaj principoj, ke universala helpa lingvo devas adoptiĝi favore al Monda Paco. Ni havas kopiojn de liaj personaj mesaĝoj al la Universalaj Kongresoj de la Esperantistoj okazintaj en 1927, 1928, 1929, 1930 kaj 1931, kaj sendube li sendis multajn similajn mesaĝojn aliookaze. Shoghi Effendi ne nur varme respondis kiam propono estis farita al li, sed ofte mem iniciatis sendi bahaajn reprezentantojn de li elektitajn al diversaj konferencoj kies interesoj koincidis kun tiuj de la bahaanoj. Tiel ni trovas lin skribi al la Universala Asocio de Esperantistoj en 1927 ke Martha Root kaj Julia Goldman ĉeestos ĝian Kongreson en Dancigo kiel oficialaj bahaaj reprezentantoj, kaj ke li kredas ke tio »fortigos la ligojn de kamaradeco kiuj ligas la esperantistojn kun la sekvantoj de Bahá'u'lláh, unu el kies fundamentaj principoj ... estas la adopto de internacia helpa lingvo por la tuta homaro«. En lia letero al la delegitoj kaj geamikoj ĉeestantaj tiun ĉi dekanan Universalan Kongreson de Esperantistoj li skribas:

Miaj karaj kunlaborantoj en la servo al la homaro:

... estas granda plezuro por mi turniĝi al vi kaj deziri al vi tutkore plenan sukceson en la granda laboro kiun vi faras por antaŭenigi la bonon de la homaro.

Interesos vin ekscii, mi estas certa, ke rezulte de la ripetaj kaj emfazaj admonoj de 'Abdu'l-Bahá Liaj multaj sekvantoj eĉ en la foraj vilaĝoj kaj vilaĝetoj de

Persio, kien ĝis nun la lumo de okcidenta civilizacio  
apenaŭ penetris, kaj ankaŭ en aliaj landoj tra la  
Oriento energie kaj entuziasme studas kaj instruas  
Esperanton, pri kies estonteco ili vartas la plej altajn  
esperojn ...

(Rabbáni, *Priceless Pearl*)<sup>130</sup>

\*\*\*

La bahaanoj adoptu Esperanton nuntempe kiel universalan  
lingvon, eĉ se nur kiel provizoran.

(Atribuita al Shoghi Effendi)<sup>131</sup>

\*\*\*





## ALDONO: SKRIBAĴOJ PRI ALIAJ LINGVOJ<sup>132</sup>

### SKRIBAĴOJ DE BAHÁ'U'LLÁH

Vi skribis pri lingvoj. Kaj la araba kaj la persa estas laŭdindaj. Kion oni deziras de lingvo estas ke transdonu ĝi la intencon de l' parolanto, kaj ambaŭ ĉi tiuj lingvoj tion kapablas. Kaj ĉar en tiu ĉi tago la Tagstelo de dia scio leviĝis sur la firmamento de Persio, meritas tiu lingvo ĉian laŭdon.

(Tabelo al Mánikchí Šáhib: *Lawh-i-Mánikchí Šáhib*)<sup>133</sup>

\*\*\*

Lia lasta demando: »La plejparto de la Tabeloj kiujn vidis ni estas en la araba. Tamen, pro tio ke la Amato en tiu ĉi epoko estas de persa deveno, oni pri la araba lingvo rezignu kaj ĝin ignoru. Ĉar ĝis hodiaŭ la araboj mem ne komprenas la signifon de l' Korano, dum la persa lingvo estas alte aprezata, laŭdata kaj admirata inter la loĝantoj de la civilizita zono de l' terglobo. Kaj same kiel la hodiaŭa persa superas la araban tiel ankaŭ la malnovpersa, kiun multe favoras la popoloj de Hindio kaj aliaj. Tial estus preferinde ke la vortoj de Dio, laŭdegata estu la mencio Lia, ekde nun estu ĉefe liverataj en pura persa, ĉar pli altgrade altiras ĝi la korojn. Aldone estas la peto ke ĝentile la respondo al tiuj ĉi demandoj estu verkata en pura persa.«

Vere, la lingvo persa ege dolĉas kaj plaĉas, kaj de kiam tiu ĉi peto submetiĝis je Lia plej benita kaj ekzaltita kortego revelaciigis multnombraj epistoloj en tiu lingvo. Rilate la aserton koncerne la Koranon - ke ĝia ekstera signifo ne

estas komprenita: vere ĝin oni interpretis tre varie kaj tradukis al sennombraj lingvoj. Kion la homoj ne kapablis kapti estas ĝiaj kaŝitaj misteroj kaj internaj signifoj. Kaj ĉio, kion ili diris aŭ diros estas restriktita kaj proporcia al ilia rango kaj stato. Ĉar neniu povas sondi ĝian veran signifon krom Dio, la Unusola, la Nekomparebla, la Ĉion-Scianta. ...

Skribis la distingita Ŝāḥib: »Pro tio ke la Amato en tiu ĉi epoko estas de persa deveno, oni pri la araba lingvo rezignu kaj ĝin ignoru.« Tiurilate elfluis el la Plumo de l' Plej Alta, laŭdata kaj altigata estu Lia gloro, tiuj ĉi vortoj sublimaj: »Kaj la araba kaj la persa estas laŭdindaj. Kion oni deziras de lingvo estas ke ĝi transdonu la intencon de l' parolanto, kaj ambaŭ ĉi tiuj lingvoj tion kapablas. Kaj ĉar en tiu ĉi tago la Tagstelo de Dia scio leviĝis sur la firmamento de Persio, meritas tiu lingvo ĉian laŭdon.«

La lumo de l' vero ja abunde brilas super la horizonto de l' dia parolado kaj sekve ne estas bezonata plia klarigo de tiu ĉi animo forpasema aŭ de aliaj kiel li. Kvankam ne kontestebblas nek dubindas la dolĉeco de la persa lingvo, ĝi tamen ne havas la esprimpovon de la araba. Estas multaj aferoj ne esprimeblaj en la persa, tio estas: ne elpensiĝis vortoj por tiaj aferoj, dum en la araba troviĝas pluraj vortoj priskribantaj la saman aferon. Fakte ne ekzistas en la mondo lingvo tiel vasta kaj ampleksa kiel la araba. Tiun ĉi aserton instigas vero kaj justo; aliflanke klaras ke en tiu ĉi tago la mondon iluminas la splendoj de tiu Suno leviĝinta sur la horizonto de Persio kaj ke apenaŭ eblas troe taksi la meritojn de tiu ĉi dolĉa lingvo.

(Respondoj al demandoj de Mánikchí Ŝāḥib el Tabelo al Mírzá Abu'l-Faḍl)<sup>134</sup>

\*\*\*

SKRIBAĴOJ DE 'ABDU'L-BAHÁ

Ho servantino de Dio! Studu la persan kaj ĝin pli proprigu al vi tagon post tago, ĉar per la studado de tiu ĉi lingvo estas obtenataj grandaj kaj senlimaj rezultoj. (Letero al individuo)<sup>135</sup>

\*\*\*

Laŭdata estu Dio! Jen la tagiĝo de la lumo de unueco inter la popoloj orientaj kaj okcidentaj. En Persio estas vaste studata la angla lingvo kaj en Ameriko kelkaj karaj animoj amas la persan lingvon. En ambaŭ landoj estas studataj la respektivaj lingvoj. Tio en si mem estas pruvo ke Oriento kaj Okcidento [laŭlitere: loko de sunleviĝo kaj sunsubiro] interpremos manojn kiel du familioj. Leviĝos la standardo de l' unueco kaj efektivigĝos la rimedo por amo kaj amikeco. Strebu kompletigi la studadon de la persa – tiel kapablu vi legi la epistolojn de la Benita Perfekteco, kaj ilin traduki, kaj sen helpo de interpretisto legi ĉiujn miajn leterojn al vi. (Letero al individuo)<sup>136</sup>

\*\*\*

LETEROJ SKRIBITAJ NOME DE SHOGHI EFFENDI

Shoghi Effendi tre ĝojis aŭdi, ke vi intencas studi tre serioze la persan. Se tion vi farus, akirus vi abundan rekompencan por viaj laboroj, ĉar tiam vi povos rekte aliri la skribaĵojn mem. (Letero de la 14a de Januaro 1932)<sup>137</sup>

\*\*\*

Shoghi Effendi tre ĝojis ekscii ke la nova eldono de la *Íqán* sekure vin atingis kaj vi uzos ĝin por revizii vian tradukon al la germana. Li certe tre bedaŭras ke ne sciante la persan vi ne havas aliron al la originalo mem. Li sincere esperas ke post nelonge ni havos kelkajn de la pli junaj membroj de la germanaj bahaanoj, kiuj tradukadon faros sia vivlaboro kaj kun tiu celo profunde studos la persan kaj la araban. Ili certe farus admirindan servon al kaj sia nacio kaj ankaŭ la Kredo ĝenerale.

(Letero de la 24a de Februaro 1932)<sup>138</sup>

\*\*\*

Studi la persan estas bonege, kaj post tio ĉi faru ĉian klopodon ekregi la anglan lingvon, ĉar ĝi ebligos al vi paroli kun homoj de ĉiuj homgrupoj kaj legi la vastan literaturon pri la Kredo kaj pri ligitaj temoj haveblan en tiu lingvo.

(Letero de la 1a de Aŭgusto 1941)<sup>139</sup>

\*\*\*

Komprenoble vi estas tute libera studi la persan aŭ la araban se vi deziras; sed li konsilas al vi koncentriĝi je la angla, ĉar ĉiuj gravaj instruoj de la Kredo estas tradukitaj al la angla kaj estas aŭtoritataj. Kapti la Instruojn en la originala persa kaj araba estus senfine pli malfacila tasko kaj postulus multe pli da tempo, aparte ĉar vi troviĝas tiel for de la landoj, kie oni parolas tiujn ĉi lingvojn.

(Letero de la 3a de Majo 1956)<sup>140</sup>

\*\*\*

TEKSTOJ SKRIBITAJ NOME DE LA UNIVERSALA DOMO DE JUSTECO

Dum ĝis nun la Esplordepartemento ne povis trovi eldirojn en la Bahaaj Skribaĵoj rilate al la persa lingvo en la kunteksto de diskuto pri la universala lingvo, estas tamen pluraj tekstoj en kiuj 'Abdu'l-Bahá kaj Shoghi Effendi kuraĝigis la kredantojn en la Okcidento studi la persan ...

Ĉar la Skribaĵoj de la Kredo estis ekde la plej fruaj tagoj tradukitaj al la angla, 'Abdu'l-Bahá kaj Shoghi Effendi kuraĝigis la kredantojn en Eŭropo kaj Azio studi la anglan. Estas tamen nenio en la bahaaj instruoj kio sugestas ke la angla estos la internacia helpa lingvo.

(Memorando de la Esplordepartemento, 1995)<sup>141</sup>

\*\*\*



## GLOSARO

### **‘Abdu’l-Bahá (1844–1921)**

En Sia testamento Bahá’u’lláh asignis la gvidadon de la bahaa komunumo kaj la interpretadon de la bahaaj sanktaj skribaĵoj al Sia plej aĝa filo, ‘Abbás Effendi, konata laŭ la titolo ‘Abdu’l-Bahá (Servanto de Bahá) kaj de bahaanoj ofte ankaŭ nomata »la Majstro«.

### **Báb (1819–50)**

Fondinto de la Báb-a religio, kiu antaŭiris la Bahaan Kredon. En 1844, 24-jara, Siyyid ‘Alí-Muḥammad, komercisto el Ŝirazo, Irano, asertis esti la Qá’im (aŭ Mahdi), kiel promesita en ŝijaismo Islamo. Liaj skribaĵoj, kun tiuj de Bahá’u’lláh, konsistigas la kernajn skribaĵojn de la Bahaa Kredo. Siyyid ‘Alí-Muḥammad alprenis la titolon de Báb, kio signifas »Pordego«.

### **Bahaa Esperanto-Ligo (BEL)**

La oficiala organizaĵo de la bahaanoj, kiuj estas esperantistoj. Ĝi estis fondita la 19an de Marto 1973 kun aprobo de la Universala Domo de Justeco. En 2011 BEL havis 400 membrojn en 64 landoj. Agadoj lastatempaj de BEL inkluzivas partoprenadon en la Universalaj Esperanto-Kongresoj, okazan eldonadon de bahaaj artikoloj en esperantaj revuoj kaj la tradukadon de bahaaj dokumentoj.

### **Bahaa Internacia Komunumo (BIK) – (Bahá’í International Community, BIC)**

Neregistara organizaĵo (NRO) kun oficejoj en Novjorko, Ĝenevo, Bruselo, Adisabebo kaj Ĝakarto, kiu reprezentas la tutmondajn bahaanojn ĉe la Unuiĝintaj Nacioj (UN), la

Eŭropa Unio (EU) kaj aliaj tutmondaj institucioj. La BIK kunlaboras konsultiĝe kun la UN kaj ĝiaj agentejoj, kun ŝtatoj, interregistaraj organizaĵoj kaj NRO-oj pri temoj kiel seksegaleco, homaj rajtoj kaj ekologio.

### **Bahá'u'lláh (1817–92)**

Fondinto de la Bahaa Kredo (1863), naskita kiel Mírzá Ĥusayn-'Alí en 1817 en nobela familio en la persa provinco Mazandarano. Bahá'u'lláh (la Gloro de Dio), kiu komence estis gvidanto en la Báb-a movado, tra 40 jaroj da ekzilo kaj enkarceriĝo verkis pli ol cent el la ĉefaj bahaaj skribaĵoj – la plej gravaj la Kitáb-i-Aqdas (Libro de Leĝoj) kaj la Kitáb-i-Íqán (Libro de Certeco).

### **Cart, Théophile (1855–1931)**

Franca lingvisto, kiu estis unu el la elstaraj personoj de la Esperanto-movado dum la tri unuaj jardekoj de la 20a jarcento.

### **Epistolo al la Filo de la Lupo (Lawḥ-i-Ibn-i-Dhib)**

La lasta ĉefverko de Bahá'u'lláh. Ĝi estis verkita por islama kleriko kiu, kune kun sia ekleziana patro, violente kontraŭstaris kaj persekutis la bahaanojn.

### **Gardanto de la Kredo**

*Vidu* Shoghi Effendi

### **Kitáb-i-Aqdas (Libro de Leĝoj)**

La »Plej Sankta Libro« revelaciita de Bahá'u'lláh kiel ĉarto de la socio en la bahaa epoko.

### **Kitáb-i-Íqán (Libro de Certeco)**

Prezentado de la esencaj instruoj pri Dio kaj religio, revelaciita de Bahá'u'lláh.



**Majstro, La**

*Vidu* 'Abdu'l-Bahá

**Pilgrimaj notoj**

Neoficialaj registroj fare de individuoj pri siaj renkontiĝoj kun la centraj personoj de la Bahaa Kredo. Tiujn notojn, kvankam ili povas vaste diskonigi, oni ne povas konfirmi kiel precize prezentantajn tion, kion ekzemple 'Abdu'l-Bahá aŭ Shoghi Effendi eventuale diris. La aŭtoroj eble misaŭdis, mismemoris, mistradukis, misripetis kaj/aŭ miskomprenis la rimarkojn faritajn.

**Ruĥíyyih Rabbání (1910–2000)**

Edzino de Shoghi Effendi. Naskita kiel Mary Sutherland Maxwell en 1910 en Novjorko. Ŝi estis la sola filino de William Sutherland Maxwell kaj lia edzino May Bolles.

**Shoghi Effendi, Shoghi Effendi Rabbání (1897–1957)**

Pranepo de Bahá'u'lláh; nomumita Gardanto de la Kredo fare de lia avo 'Abdu'l-Bahá. Je la morto de Shoghi Effendi estis sub lia egido starigita la monda bahaa komunumo ekde la loka nivelo, tiel ke en 1963 povis esti elektita la Universala Domo de Justeco.

**Spiritaj Asembleoj**

En la Bahaa Kredo la administran aŭtoritaton ne havas individuoj aŭ klerikoj sed korporacioj de naŭ membroj elektitaj ĉiujare je loka kaj nacia niveloj, konataj respektive kiel »Lokaj Spiritaj Asembleoj« (LSA-oj) kaj »Naciaj Spiritaj Asembleoj« (NSA-oj).

**Tabeloj**

Leteroj, traktaĵoj kaj aliaj temaj, memstaraj tekstoj

skribitaj aŭ de la centraj personoj de la Baba kaj Bahaa Kredo, aŭ fare de iliaj sekretarioj.

### **Universala Domo de Justeco, La**

La internacie gvida bahaa korporacio, konsistanta el naŭ membroj, kiu havas sian sidejon en Ĥajfo (Haifa), Israelo. Ĉiun kvinan jaron ekde 1963 la membroj de la Naciaj Spiritaj Asembleoj de la mondo elektas la membrojn de tiu ĉi institucio, kiu havas superan aŭtoritaton leĝodonan kaj gvidan super la aferoj de la monda bahaa komunumo.

### **Zamenhof, Ludoviko Lazaro (1859–1917)**

Pola okulkuracisto kaj iniciatinto de Esperanto, la ĝis nun plej disvastiĝinta artefarita aŭ konstruita lingvo, nomita laŭ lia pseŭdonimo.

## BIBLIOGRAFIO

[Noto de la eldonanto: Tiu ĉi bibliografio estas tiu de la angla originalo de tiu ĉi libro kun aldono, kie ili ekzistas, esperantlingvaj fontoj. Nepublikigitaj leteroj listigitaj en la bibliografio troviĝas en la bahaa internacia arkivo en Ĥajfo, Israelo.]

- 'Abdu'l-Bahá. *On the Importance of Divine Civilization*, tradukita el la persa de Mirza Ahmad Sohrab. *Asiatic Quarterly Review*, vol. 1, n-ro 2 (Aprilo 1913).
- Letero al d-ro Ameen Fareed (Amin Farid), en *The British Esperantist*, vol. 7, n-ro 84 (Dec. 1911).
  - *Parizaj Paroladoj de Abdul Baha*. Weinheim: Bahaa Esperanto Eldonejo La Nova Tago, 1932.
  - *The Promulgation of Universal Peace*. Wilmette, IL: Bahá'í Publishing Trust, 1982.
  - *Selections from the Writings of 'Abdu'l-Bahá*. Ĥajfo: Bahaa Monda Centro, 1978.
  - *Tablets of Abdul-Baha Abbas*. Novjorko: Bahá'í Publishing Committee; vol. 1, 1930; vol. 2, 1940; vol. 3, 1930.
- Abdul Baha on Divine Philosophy*. Kompilita de Isabel Fraser Chamberlain. Bostono: The Tudor Press, 1918.
- 'Abdu'l-Bahá in London. Londono: Bahá'í Publishing Trust, 1987.
- »Aus dem Schatz der Erinnerungen an Abbas Effendi, 'Abdu'l-Bahá. Ĥajfo: Zweiter Brief von Frau Dr. med. J. Fallscheer an Frau A. Schwarz«, en *Sonne der Wahrheit*, vol. 10, kajero 4. Stutgarto, 1930. Provizora traduko de la eldonantoj el la germana.
- Bahá'í International Community/Bahaa Internacia Komunumo (BIK). *Bahá'u'lláh. Enkonduko en la vivon kaj verkon de la Fondinto de Bahaismo*, Deklaro preparita de la Bahaa Internacia Komunumo, Oficejo por Publika Informado, Novjorko; Belvaux: Bahaa Esperanto-Ligo, 1992.
- *Rights of Minorities: Comments on the Draft Declaration. Statement*

- Submitted to the 48th Session of the United Nations Commission on Human Rights.* BIK dokumento n-ro 92-0207. Ĝenevo: Bahá'í International Community, 1992.
- *Turning Point for All Nations: A Statement of the Bahá'í International Community on the Occasion of the 50th Anniversary of the United Nations.* Novjorko: Bahá'í International Community United Nations Office, 1995.
- Bahai Scriptures.* Novjorko: Brentano's, 1923.
- Bahá'í World, The.* volumoj 1-12 (1925-54). Represo. Wilmette, IL: Bahá'í Publishing Trust, 1980.
- Bahá'í World Faith.* Wilmette, IL: Bahá'í Publishing Trust, 2a eld. 1976.
- Bahá'u'lláh. Epistle to the Son of the Wolf.* Wilmette, IL: Bahá'í Publishing Trust, 1988.
- Glad-Tidings: *Bishárát*, en *Tablets of Bahá'u'lláh*, p. 19-29.
  - *Gleanings from the Writings of Bahá'u'lláh.* Wilmette, IL: Bahá'í Publishing Trust, 1983.
  - *The Kitáb-i-Aqdas.* Ĥajfo: Bahaa Monda Centro, 1992.
  - *Nafahát-i-Quds.* Nov-Delhio: Bahá'í Publishing Trust, sen dato.
  - »Responses to questions of Mánikchí Šáhib from a Tablet to Mirzá Abu'l-Fadl«, en: *Tabernacle of Unity*, pp. 13-54.
  - Splendours: *Ishráqát*, en *Tablets of Bahá'u'lláh*, pp. 99-134.
  - *Tabernacle of Unity.* Ĥajfo: Bahaa Monda Centro, 2006.
  - Tablet to Mánikchí Šáhib: *Lawh-i-Mánikchí Šáhib*, en: *Tabernacle of Unity*, p. 1-11.
  - Tablet of Maqsúd: *Lawh-i-Maqsúd*, en *Tablets of Bahá'u'lláh*, p. 159-78.
  - Tablet of the World: *Lawh-i-Dunyá*, en *Tablets of Bahá'u'lláh*, p. 81-97.
  - *Tablets of Bahá'u'lláh revealed after the Kitáb-i-Aqdas.* Ĥajfo: Bahaa Monda Centro, 1978.
  - Words of Paradise: *Kalimát-i-Firdawsíyyih*, en *Tablets of Bahá'u'lláh*, p. 55-80.
- Bolles, Jeanne. *The Bahai Movement and Esperanto*, en *Star of the West*, vol. 11, n-ro 17, 19a de Januaro 1921, p. 286-7, 290-1.
- British Esperantist, The* (ĵurnalo de Brita Esperanto-Asocio), vol. 7, n-ro 84 (Decembro 1911); Februaro 1913.
- Cart, Théophile. *Vizito al Abdul Baha, Lingvo Internacia*, Marto 1913.
- *Vortoj de Profesoro Cart.* Jaslo, Pollando: Esperantista Voĉo, 1927.
- Century of Light.* Ĥajfo: Bahaa Monda Centro, 2001.

- Couturat, Louis. *A Plea for an International Language*. Londono: George Henderson, 1903.
- kaj L. Leau. *Histoire de la Langue Universelle*. Parizo: Hachette, 1903.
- Crystal, David. *English as a Global Language*. Kembriĝo: Cambridge University Press, 1997.
- Dalgarno, George. *Ars Signorum: Vulgo Character Universaliset Lingua Philosophica*. Londono: J. Hayes, 1661.
- Eco, Umberto. *La serĉado de la perfekta lingvo en la eŭropa kulturo*, Edistudio, 1994
- Esslemont, John E. *Bahá'u'lláh kaj la nova epoko*. Dua eldono, Bahaa Esperanto-Ligo, 1978.
- Gollmer, Werner. *Mein Herz ist bei euch: 'Abdu'l-Bahá in Deutschland*. Hofheim-Langenhain: Bahá'í-Verlag, 1988.
- Heller, Wendy. *Lidia. La vivo de Lidia Zamenhof. Filino de Esperanto*. Antverpeno: FEL, 2007.
- Jespersen, Otto. *Selected Writings of Otto Jespersen*. Londono: George Allen & Unwin, 1962.
